


# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

TURISMO




Plouézec  
en  
Francio

ALBANIO:  
la situacio  
de la  
pensiuloj


## KANCERO

### La batalo daŭras



# Nova sistemo por instrui la internacian lingvon

**ESPERANTO  
PASPORTO AL LA  
TUTA MONDO**



**VIDBENDA KURSO  
POR INSTRUI  
LA INTERNACIAN LINGVON**

**Verkita de d-ro Paul Gubbins**

Laŭ koncepto de Edwin Grobe

© 1998, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Mendu la PAL-version ĉe:

Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Tel:+32 3 234 34 00

Reto: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:

81 EUR + afranko

Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:

81 EUR + afranko

## ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO


Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne brem-

sas la disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

**Prof. Duncan Charters**

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Estimataj gelegantoj,

**Ĉ**i-momente en Eŭropo homoj ofte ne plu scias, kion manĝi, se ili ne estas vegetaranoj, ĉar en la viando de preskaŭ ĉiuj brutoj embuskas malsanoriskoj. En tia situacio estus bone, se ni ankoraŭ havus la rubrikon „kuir-recepto” kiel dum multaj jaroj ekde la fondiĝo de la revuo. Tiam redaktis ĝin Maria Becker-Meisberger, kaj ĝi estis tiom sukcesa, ke el tio estiĝis la libro Internacie Kuiru, bone vendata verko. Bedaŭrinde post la morto de nia kara Maria ni ne trovis konstantan novan prizorganton. Nun turnis sin al mi kuiristo, tamen kun iom alia ideo. KOUVENI A. Jacques el Ebur-Bordo skribas: „Mi ne min trompas kredante, ke multaj esperantistoj ŝatas kuirarton, eĉ se neniu statistiko tion klare montras. Laŭ mi, la palpebla fakto aŭ atesto estas Internacie Kuiru.” Li do supozas, ke inter niaj legantoj estas aparte multaj ŝatantoj de kuirarto; efektive ja neniam mankis receptoj; mankas nun nur redaktoro. Kouveni lernis ne nur la afrikan, sed ankaŭ francan kuirarton kaj praktikas sian profesion jam de kvar jaroj. Liaj ideo kaj deziro estas krei fak-asocion de kuirartistoj kaj ŝatantoj de kuirarto. Nu, eble ne devas esti asocio; eble ja sufiĉus „Rondo Kulinara”. Imagu, se estonte en kongresejoj diverslandaj majstroj de kuirarto proponus ne plu nur tiujn tedajn „internaciajn” sandviĉojn, sed verajn kulinariajn delikataĵojn el la vasta mondo! Nu, kion vi opinias? Se vi trovas la ideon interesa, skribu al mi aŭ rekte al li sub la adreso: s/c ADJE Martin, BP 07, CI-175 Abidjan 07, Ebur-Bordo / Côte-d'Ivoire.

Sincere via Stefan Maul

<b>leteroj</b> .....	4
<b>el mia vidpunkto</b> .....	5
- Leporo kaj testudo	
<b>politiko</b> .....	6
- KONGO: Kiu lin murdis?	
- JAPANIO: Ĉu vere „burleskaĵo”?	
- MAKEDONIO: Koalicia kolapso	
- NORD-IRLANDO: Jen la tub-ero	
<b>ekonomio</b> .....	8
- ALBANIO: Pensiuloj en postkomunisma lando	
- GERMANIO: MMM - Foira magneto en Manhajmo	
<b>moderna vivo</b> .....	10
- SOCIA JUSTECO: Eblas alia mondo ▶	
- BULGARIO: Kiam ĉesas la dancado ...	
- <b>Notoj:</b> Senpage manĝi	
<b>serio</b> .....	12
- <b>Historio de la ekonomika pensado / Parto 3:</b> La klasika ekonomiko	
<b>spirita vivo</b> .....	16
- AŬSTRIO: Pri la aktuala rolo de la religioj	
- MONAĤEJOJ: Realigita revo de la papo ▶	
<b>komputado</b> .....	18
- TEKSTOTRAKTADO: Sidiĝu kaj tajpu!	
<b>lingvo</b> .....	21
- IRLANDO: Pli bunta kulturo	
<b>scienco</b> .....	22
- KANCERO: Novaj kuracmetodoj kaj prevento ( <b>Kovrilo</b> )	
- MEDICINO: Juneco ŝrumpinta	
- ĈINIO: Kloni grandan pandon	
- <b>Notoj:</b> - Multobla sklerozo - plu mistera - Per tramo tra nia planeda sistemo	
<b>turismo</b> .....	26
- FRANCIO: Plouézec ▶	
<b>novelo</b> .....	27
- de Hori Yasuo: <i>Kron-Put</i> Vjetnama bambua muzikilo	
<b>libroj</b> .....	30
<b>informoj de l' MONATO</b> .....	33
<b>ŝerco &amp; satiro</b> .....	34



## Ŝatata revuo

La revuo MONATO estas interesa, do mi legas ĝin volonte kaj detale. Tre surprizis min rimarko de mia samlandano (MONATO, 2000/12, p. 4), ke „Ŝerco kaj satiro” el n-ro 11 estas ŝoka. Mi legis la paĝon kaj nenio ŝokis min. Eble la artikolo enhavas iun kaŝitan signifon, kiun mi ne kaptas. Evidentiĝas, ke ĉiun io alia ŝokas.

Helena BURCHARDT, Pollando

## Prefere antaŭruĝa

En la artikolo „Erupcias maltrankvilo” (MONATO, 2000/12, p. 16) mi trovis vorton, kiun mi opinias malĝusta: transruĝa. La aŭtoro certe pensis pri radiado kiun varmaj objektoj eligas, kaj en la optika spektro ilia radiado troviĝas antaŭ la ruĝa koloro. Pri tio oni povas pli detale legi en mia optiko-libro: [www.esperanto.hu/libroj/index.htm](http://www.esperanto.hu/libroj/index.htm).

János SÁRKÖZI, Hungario

## Kompati trompitajn virojn

Kiel Antanas Grincevičius (MONATO, 2001/1, p. 4) mi kompatas la Kursk-submarŝipanojn kaj konsentas: ili heroe mortis. Sed kial? Ĉu ili ankaŭ kredis, ke naciaj valoroj kaj armeo alportas homan feliĉon? Ĉu ili sciis, ke armeo, nur murdante kaj detruante, neniam protektis kaj protektos popolon, sed ĉiam sin nutras per ŝvito, sango kaj aflikto de homoj, kiel faras parazito? Ĉu ili mortis pro prestiĝo, kiel skribis Stefan Maul? Laŭ mi ili mortis pro homa stulteco, kiu elpensas ilojn por sinmortigi. Ni kompatu al eble nur trompitaj „veraj viroj”!

Michel MARKO, Francio

## Statistiko pripensinda

La jar-abonan statistikon (MONATO, 2001/1, p. 3) mi legis je nur unu okulo ridanta. La dua okulo emis plori. Salutinda internacieco de la enhavo kaj de la abonantaro supozeble formas bonan bazon por ekspansii. Sed ĉirkaŭ 1000 abonantoj restas relative malgranda aro. Kvankam mi ŝatas ekonomian efikecon de la eldonistaro, jarbuĝeto (taksata) de malpli ol 50 000 eŭroj certe ne sufiĉas por ekspansii rimarkinde.

Sur la globo ankoraŭ tro multaj „blankaj” regionoj aperas. Ankaŭ la „griza” Rusio montras nekontentigan staton. Mi tuj decidis sendi mian propran ekzempleron de la revuo al rusa korespondamiko en Volgogrado. Sed mia konsci-

enco de esperantisto demandas min: „Kial ne subteni abonhelpan fonduson por pliigi abonantojn en Rusio – almenaŭ ĝis numero ducifera?”


Josef FLIEGNER, Germanio

## Paranoja reago (1)

Iu PS recenzis mian *Neniu ajn papilio* (MONATO, 2001/1, p. 31), klare antaŭsentante, ke mi, kiel aliaj „bonaj aŭtoroj” (la citiloj malhelpas, ke mi tro orgojlu), reagos paranoje al lia ruĝa kraĵono. Se PS ĉiam recenzas kun tia supereca lemejestra aplombo, tia reago estas facile komprenebla. Fakte mi ĝis nun neniam reagis al recenzo, sed mi pli profitis, mi kredas, de kritikoj ol de laŭdoj. Sed mi esperas, ke mia ĉi-foja respondo instigos legantojn mem kontroli, ĉu mi aŭ PS pli pravas.

Pli ol duono de la tre longa recenzo temas pri „fuŝoj”. Mi tre mallonge aludu al miaj propraj „fuŝoj”. Jes, mi pekas kontraŭ ŝulcaj principoj: la anglo Mark ne iĝas Marko, kaj la germana Ulrike ne estas Ulrikino, kaj nek li nek ŝi ricevas beligan akuzativan -on. Anglismoj? Germanismoj? PS asertas, sed donas eĉ ne unu ekzemplon. Pardonu, eble li atingas duonpoenton per la „blanka mensogo”. Nepravigitaj poeziaj neologismoj? Eĉ ne unu ekzemplo citita. Jes, mi provis redoni la efikon de „dialektoj” de la germana parolata de malkleraj slavoĵ. Dum kelkaj jaroj mi, germanisto, intime observis tiajn „dialektojn”, kaj slava legantino ĵus gratulis min pri la trafeco de mia provo. Ĉu PS havas tiukampajn spertojn, mi ne scias: refoje li asertas „plenan fiaskon”, sed donas neniun ekzemplon. Jes, estas ludeto, en kiu la rakontanta „mi” foje zigzagas inter la iama Mark kaj la nuna „editoro”; sed kun tiom da kuntekstaj indikoj, ke mi taksas, ke meze inteligenta leganto bezonas kvin sekundojn por orientiĝi.

Kial mi malice skribas pri PS, kiam la homo elektas nomi sin Pejno Simono? Nu jes, mi respektas lian rajton fari tion, sed mi miras, ke en recenzo nekutime longa li tute prisilentas mian nomon. Eble li punas min pro



tio, ke mi lasas ĝin en la formo heredita de miaj gepatroj.

Sed ĉefe kolerigas min la bombasta, vunda galŝprucigo kontraŭ Herbert Mayer, la eldonisto. Jes, estas tre bedaŭrinde, ke multe da majusklaĵ „K” minuskliĝis. Nur unu persono bedaŭras tion pli ol mi: Herbert. Konstatinte tiun eraron, la bonkorulo pripensis detruiri la tutan stokon kaj represi. Ĉar li jam ofertas multe da mono por subteni nian literaturon, mi persvadis lin ne fari tion: leganto facile orientiĝas, kaj la eraro ne stumbligas, mi kredas. Mi volas nur publike danki Herbert kaj nian grafikiston Miguel pro la plaĉa aspekto de la libro.

Trevor STEELE, Litovio

N.d.l.r.: La libro *Neniu ajn papilio* de Trevor Steele haveblas en la libroservo de FEL ([retbutiko.esperanto.be](http://retbutiko.esperanto.be)) kontraŭ EUR 16,50 + sendokostoj.

## Paranoja reago (2)

La rubriko „libroj” sinkas. Post vera juvelo pri la lasta poemaro de Neves, ŝajne verkita de kunlaborinto de *La Esperantisto*, MONATO sukcesis superi sin per neimagebla komentario pri „Neniu ajn papilio” (MONATO, 2001/1, p. 31). Tuj okulfrapas la nekompetenteco de la recenzinto pro lia nula kono de la antaŭa verkaro de Steele kaj, sekve, de la nuntempa Esperanto-prozo. Krom tio, se la ulo plenigas duonon de sia komentario pri majuskligoj, vorto-divido kaj (post pli ol 120 jaroj da Esperanto!) taksas eraro neesperantigi ĉiujn proprajn nomojn, oni demandas sin, kial la koncerna redaktoro ne forbalais almenaŭ ĉi duonon. La alia duono almenaŭ taŭgus por loka bulteneto, sed por unu el la ĉefaj gazetoj nialingvaj, ĝi estas skandale subnivela.

Hèctor ALÒS I FONT, Katalunio

N.d.l.r.: Ni lasas „pli ol 120 jaroj” kiel poetan troignon!

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn kaj glatigi la stilon (=zamenhofa!). Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

[guido@fel.esperanto.be](mailto:guido@fel.esperanto.be)

# Leporo kaj testudo

„Ne utilas tro rapidi, sufiĉas starti ĝustatempe”, diris Lafonteno en sia konata fablo. La tutmondigita, multnacia, tro fama firmao Monsanto okaze de la lanĉo de siaj Organismoj Genetike Modifitaj (OGM) reklamis tre trafe per tiuj samaj bestoj. La leporo estas simbolo por prolifera kresko de la surtera loĝantaro, kaj la testudo estas simbolo por la malrapida kresko de produktado de porhomaj nutraĵoj.

## Nutraĵo – Sano – Espero

Ĝuste tio estas la devizo de Monsanto, sed ni rajtas dubi, ĉu „nutraĵo-sano-espero” ne signifas por la koncernaj konzernanoj ekskluzive „kurzon en borso”. Al la akciuloj sendube ne interesas scii, ke ĉiutage 230 000 homoj pliaj aperas sur la tersurfaco, sed falo de 30 % en la kurzo de la akcioj estas ja katastrofo. La tro rapida surmerkato de la OGM-aĵoj lasis dubojn rilate al sano kaj ne transdonis plenan esperon.

La homoj moderne vivas en konstantaj fobioj kaj ne facile akceptas riskojn; kompanse ili fidas je providencoj, kiuj evidente nenian efikon havas. En meza pozicio situas scienco kaj tekniko. Profesoro pri biologio Gilles-Éric [ĵil erik] Séralini konfesas sian maltrankviliĝon pri la danĝero enmeti genojn por sistema produktado de insekticido ene de sojo kaj maizo. La sekreciado de veneno povas esti de 10- al 100 000-oble pli granda ol normala aplikado sur la plantoj. La testoj pri efiko ĉe la homoj ne estis sufiĉe funde faritaj, la konkludoj estis tro rapidaj, klarigas Séralini ... ĉu ni forgesis la tumorojn, kiujn provokas DDT ĝis nun?

## OGM ne novaĵo

Alia fakulo, Alain Catala [alén katalá], rememorigas, ke la genetika interveno de la homo ne estas novaĵo. En la 1950aj jaroj ni uzis „genealogian selekton”, la hibridojn. Neniu volis tiun artefaradon, sed la bezono pri nutraĵoj venkis. En la 1980aj jaroj nova tekniko, la „transgenezo”, aplikigis en la tuta mondo krom en la timema Eŭropo, kun granda sukceso. En Hindio en tiu sama epoko ekonomiisto M. S. Swaminathan evitis amasajn mortojn pro malsato per dekobligo de la produktiveco rilate al cerealoj. Ĉu la hindoj fartas malbone pro tio? Aŭ ĉu ni revenu al la testuda rendimento de niaj prauloj: semi 200 kg por rikolti 300 kg da grenoj?

## Nia tero ne sufiĉas

La neregistara organizaĵo WWF (Tutmonda Fondaĵo por la Naturo) informis, ke la nuntempaj bezonoj kaj eluzado de vivrimedoj fare de la

homaro preterpasis je 42,5 % la renovigan kapablon de nia tero. Tio signifas, ke nia vivmedio, ke nia propra tero estas en danĝera procezo de findetruo. La „raporto viva planedo 2000” baziĝas sur iu ekologia premo, kiun ĉiu homo faras sur nia globo en konsidero al la 6 miliardoj, kiuj tie nun vivas. La premo entenas ne nur la nutraĵojn, sed ĉiujn pliajn materialojn, energion, ĉerpatajn en areo biologie produktiva.

WWF kalkulis, ke ĉiu homo disponas pri 2 hektaroj, sed por la nutraĵoj, por la arbaraj produktoj (ligno, papero, karbo) kaj por la sorbo de poluaĵoj, karbonidaj gasoj k.a., ĉiu homo bezonas 2,85 ha, do plian duonteron! La punkto de ekvilibro estis transpasita en 1975.

## Ŝercaj serĉadoj

La inteligentaj homoj kompreneble pensis pri multaj solvoj, ekzemple la koloniigado de aliaj planedoj, luno, Marso, kiuj nepre havas akvon, do

latentan vivon, sufiĉas konkeri ilin. Amuze, same kiel rilate al militaj konkeroj oni ne pensas pri la kostoj. Ĉi tio ne eniras la ludojn en borsoj. Serĉado ne estas spekulado, estas ambicio, konkerado ĝis fina venko.

Tiel, sed alidirekte pensas la malpli inteligentaj homoj: la dia providenco ĉiam solvis la surterajn problemojn – kiaj leporaj solvoj! Dume nia tero grumblas; depost la punkto de ekvilibro 1975, kiun WWF citis, oni nur parolas pri ekologio,

pri inundoj post sekeco, pri katastrofaj klimataj ŝanĝoj, varmiĝo tie, malvarmiĝo ĉi tie, dezertiĝo, forceja efiko, ozona detrua truo, acidaj pluvoj, netrinkebla akvo, senfina poluado, detruo, detruado aŭ elsavo de Amazonio, la tutmonda posedaĵo, ĉu?

Paul Hawken kaj Amory Lovins, ŝercemaj serĉistoj, skribis la seriozan verkon „Natura Kapitalismo”, kies apliko de la enhavo devus ordigi nian mondon. Ili timide aludis, ke tio nur okazos, kiam la homoj limigos sian avidon, sian kapitalisman spekuladon en borsoj, jen la problemo.

Sen tro longa rondiro ni revenas al la solvoj de Monsanto kun OGM, t.e. ioma simpla modifo de la homaj cerbaj genoj.

Ne devas ekzisti alia solvo preter la katastrofoj. Oni jam kapablas klasigi ĉiujn elementojn de niaj genoj, do jen tre primara operacio: forigo de homa avido, de spekulado, de troa stulteco (ŝajnas, ke konvenas lasi kelkajn genojn de idioteco, ĉar ekscesa perfekteco estus neeltenebla kontrasto).

Tiam la ritmo de la leporoj kongruas al la kadenco de la testudoj, kaj nia mondo harmonie ordiĝus, kiel tion deziris Lafonteno. Gilbert LEDON



## KONGO

# Kiu lin murdis?


Malgraŭ asertoj, ke la prezidento de la Demokrata Respubliko Kongo, Laŭrenco Kabila, estis murdita en januaro de unu el siaj gardistoj, ankoraŭ cirkulas diversaj teorioj pri la vero.

Multaj kredas, ke Kabila estis viktimo aŭ de okcidentaj potencoj, avidaj je diamantoj en Kongo, aŭ de armeanoj de Ruando, Ugando kaj Burundio, kiuj subtenas ribelulojn en la norda kaj orienta partoj de Kongo.

Kabila, kiu fariĝis prezidento en 1997, postlasas ŝtaton dividitan pro milito. Eĉ spite de la milito, Kabila rifuzis esperi pri helpo el Okcidento, dirante, ke civitanoj en Kongo devas mem solvi siajn problemojn. Pro tio multaj taksis lin patrioto, kiu luktas kontraŭ imperiismo kaj la superpotenco de Okcidento. Rezulte li estis enterigata kun granda honoro ĉe la parlamentejo, simbolo de la sendependeco de Kongo. Ĉeestis la enterigon prezidentoj el ses afrikaj ŝtatoj: Angolo, Zimbabvo, Zambio, Sudano, Namibio kaj Malio.

## Ruinigis

Multaj tamen konsideris lin diktatoro, kiu kreis armeon konsistantan el 600 000 homoj, kaj kiu ekonomie ruinigis la landon, aĉetante interalie militaviadilojn. Nun regas malcerto pri la estonteco: pro manko de konstituciaj aranĝoj elektis politikistoj kaj armeanoj



La opozicio hezitas agnoski la rajtojn de Jozefo Kabila.

la 29-jaran filon de Kabila, Jozefo, prezidento.

Provizora parlamento, deklarinte la patron nacia heroo, akceptis la filon kiel prezidenton. Opozicianoj tamen hezitis agnoski la rajtojn de Jozefo, argumentante, ke en Kongo ne regas principo de hereda monarĥio.

Zandandu Ntomono ZOLA / pg



Ĉeestis la enterigon de Laŭrenco Kabila reprezentantoj de pluraj afrikaj ŝtatoj.

## JAPANIO

# Ĉu vere „burleskaĵo”?

Kunsidis lastatempe en Japanio kortumo simila al tiuj en mezepoka Eŭropo: t.n. „Internacia tribunalo de virinoj pri militkrimoj fare de japana milita institucio de seks-sklavinoj” esploris asertojn, ke dum la dua mondmilito virinoj el Ĉinio, Koreio kaj aliaj landoj estis perforte fortrenitaj de Japana Imperia Armeo en militajn bordelojn por plezurigi japanajn soldatojn.

Partoprenis kune kun 80 maljunaj iamaj „seks-sklavinoj” ankaŭ



Hirohito: ĉu kulpa aŭ ne?

eksterlandaj „juĝistoj”, „prokuroroj” kaj „advokatoj”, kiuj kunvenis por juĝi respondeculojn de Japana Imperia Armeo, inkluzive de eksimperiestro Showa (Hirohito). La civitana tribunalo, kunvokita de japana neregistara organizaĵo, postulis de la nuna japana registaro pardonpeton kaj kompenson.

Tamen ne videblis atestaĵoj kaj atestantoj pruvantaj la veron de la asertoj de la iamaj „seks-sklavinoj”. Plue ekzistas aferoj tiaj en ĉiuj landoj ekde antikva tempo. Tiu „Internacia tribunalo de virinoj pri militkrimoj” celas juĝi kaj damni Japanion koncerne neaŭtentikaĵojn antaŭpli-ol-duonjarcentajn surbaze de unuflankaj kaj nepruvitaj atestaĵoj de eksaj „seks-sklavinoj”. Burleskaĵo.

IGARASI Takeo

# Koalicia kolapso

**S**plitiĝis la registara koalicio en Makedonio, sed la ĉefministro Ljubčo Georgievski sukcesis certigi novan parlamentan plimulton kaj konservi sian postenon. Kaŭzis la krizon la elregistariĝo de la partio Demokratia Alternativo estrata de Vasil Tupurkovski kaj ties aliĝo al la socialista opozicio gvidata de Branko Crvenkovski.

La nova registaro registris la minimuman plimulton dum sia konfirma ceremonio. La parlamenta kunsido estis multfoje prokrastita sed finfine oni voĉdone akceptis la registaron. Forestis la opozicio, plendante, ke okupas la parlamenton nekonataj armitoj. La registaro ŝanĝis ne nur la parlamentan prezidanton sed ankaŭ la direktorojn de pluraj ŝtataj entreprenoj – adeptoj de Tupurkovski, kiu nun apartenas al la malĝusta flanko.

Evgeni GEORGIEV



Ĉefministro Georgievski sukcesis konservi sian postenon.



Tupurkovski kaj Crvenkovski (dekstre): opozicianoj en Makedonio.



## NORD-IRLANDO

# Jen la tub-ero

Dum pli ol du jaroj, ekde la batalhalto fare de la plej grandaj kvazaŭ-militistaj organizaĵoj respublikismaj kaj lojalismaj, Nord-Irlando ĝuis relativan pacon kaj pli-malpli normalajn vivkondiĉojn. Forestis gravaj amasaj atencoj, tiel ke tiu ĉi parto de la irlanda insulo fariĝis loko multe pli agrabla.

Tamen lastatempe komenciĝis bomb-atencoj precipe kontraŭ katolikaj familioj loĝantaj en protestantaj kvartaloj. La polico supozas, ke la kulpuloj estas protestantaj ekstremistoj. La bomboj – t.n. tub-bomboj, hejmfaritaj eksplodiloj el metala tubo plenigita de pulvo –, kvankam malgrandaj, kapablas kaŭzi terurajn vundojn aŭ morton. Ekde la komenco de la jaro okazas ĉiutage almenaŭ unu atenco tia. Laŭŝajne ankoraŭ ne ĉesis religia maltoleremo kaj malamo en tiu ĉi malfeliĉa provinco.

IRL

# Monato

## KONEKTIĜI

- ▶▶ **KOLOFONO**  
La bazaj informoj pri MONATO.
- ▶▶ **SPECIMENOJ**  
Specimenaj tekstoj el MONATO.
- ▶▶ **TARIFO**  
Kotizoj de MONATO en la diversaj landoj.
- ▶▶ **PERANTOJ**  
Perantoj de MONATO al kiuj vi povas pagi vian kotizon.
- ▶▶ **ABONILO**  
Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de MONATO, aŭ se vi simple volas plilongigi vian abonon, uzu tiun ĉi praktikan abonilon!
- ▶▶ **REDAKTOROJ**  
Redaktoroj de MONATO al kiuj vi sendu viajn manuskriptojn.
- ▶▶ **MANUSKRIPTOJ**  
Kiel sendi viajn manuskriptojn al la redaktoroj de MONATO.
- ▶▶ **KONVENCIOJ**  
Lingvaj kaj ortografiaj konvencioj de MONATO.
- ▶▶ **ANONCOJ**  
Anonctarifoj de MONATO.
- ▶▶ **INDEKSOJ**  
Indeksoj de MONATO por trovi aperintajn artikolojn.
- ▶▶ **RADIO POLONIA**  
Mencioj kaj recenzoj pri MONATO en Radio Polonia.
- ▶▶ **ETIKO**  
Etika kodo de ĵurnalismaj principoj (agnoskita de MONATO).

## 24 HOROJ

TTT: <http://monato.esperanto.be>

ALBANIO

# Pensiuloj en postkomunisma lando

Profesoro Isa Gorica pristudis la situacion de la 530 000 pensiuloj en Albanio kaj proponis reformojn. Jen resumo de liaj konstatoj.

**P**or faciligi la legadon, la valoroj estas plejofte menciitaj nur en usonaj dolaroj (USD). En decembro 2000 la proksimuma kurzo estis 1 USD = 150 albanaj lekoj.

## Plej malaltaj pensioj de Eŭropo

La pensioj en Albanio estas la plej malaltaj en Eŭropo. La averaĝa monata pensio en urboj nuntempe atingas 46 USD. La minimuma pensio, kiun ricevas ĉirkaŭ 136 000 urbaj pensiuloj aŭ 47 % de la tuta nombro en urboj, estas 36 USD. La maksimuma pensio estas 65 USD. Surbaze de tiuj ĉi ciferoj, kaj konsiderante la vivminimumon je 62 USD, ni konkludas, ke 87 % de la urbaj pensiuloj havas enspezojn sub la urba vivminimumo. Ne estas donitaĵoj pri la vivminimumo en vilaĝoj, sed la stato tie estas multe pli mizera.

Por havi pli precizan ideon pri la nivelo de malriĉeco, necesas diskuti pri la *reala* pensio. Kompare kun la jaro 1989, oni konstatas malpliigon. Ĉar la prezoj de la plej bezonataj nutraĵoj (la t.n. *korbo*) plialtiĝis 26,7-oble, la minimuma pensio de la jaro 2000 laŭ aĉetpovo estas nur ĉirkaŭ 62 % de tiu de la jaro 1989, kvankam la sumo estas pli alta.

## Rilato inter kontribuantoj kaj profitantoj

Laŭ oficialaj donitaĵoj tiu rilato estas 1:1, t.e. por unu kontribuanto estas unu profitanto. Tio lasas malmulte da spaco por pligrandigo de pensioj. El observoj dum la jaro 1999 en 31 distriktoj de la lando rezultigas, ke la neformala labormerkato (komerco, konstruado, ktp) ne pagas kontribu-

## Pli da impostoj

Lastatempe la registaro anoncis ke dum la jaro 2001 ĉiu albano averaĝe devos pagi ekvivalenton de 253 usonaj dolaroj (USD) da impostoj, 20 USD pli ol en la jaro 2000. Laŭ oficialaj fontoj la ŝtato tiel enspezos kiel impostojn ĉirkaŭ 23 % de la malneta nacia produkto de 3,3 miliardoj da USD (t.e. 1100 USD je persono).

Oni plialtigos la enspezojn pro doganoj kaj impostoj, tiel malpliligante la enspezojn venantajn de privatigoj kaj ŝtataj entreprenoj. Entute la buĝetitaj enspezoj plialtiĝos je 8,5 % kaj la elspezoj je 8,3 %, por iel mildigi la deficiton.

Albanoj precipe atendas ioman pliboniĝon rilate al infrastrukturo, klerigado kaj sanprotektado.

Bardhyl SELIMI



87% de la urbaj pensiuloj havas enspezojn sub la vivminimumo.

aĵojn por socialaj asekuroj. Laŭ la Ŝtata Statistika Buroo, el 520 000 memdungitoj en vilaĝoj, pagas la kontribuantojn nur 80 000.

Surbaze de la realaj ciferoj de laborantoj, en la jaro 2000 reale devus esti 1,38 milionoj da kontribuantoj en sistemo de socialaj asekuroj, kaj la rilato estu 1 380 000:530 000 aŭ 2,6:1, t.e. por ĉiu profitanto estu 2,6 kontribuantoj.

La prognozo por la jaroj 2005-2010 estas 1 800 000:600 000 aŭ 3:1. Por la jaro 2020 ĝi estas 2 300 000:700 000 aŭ 3,3:1. La kalkuloj baziĝas sur vari-



anto pesimisma, lasante spacon por plialtigo de la kontribua raporto.

### **Apliko de leĝo el la jaro 1993**

La leĝo celas pension je 75 % de la salajro. Aktuale la minimuma pensio estas 50 ĝis 60 % de la averaĝa salajro, do 15 ĝis 25 % tro malalta kompare al la leĝa difino. Tiu granda diferenco povas mildiĝi per la pligrandiĝo de nombro de kontribuantoj.

### **La malnovaj pensioj**

La ŝtata buĝeto por pensioj nun estas 200 milionoj da USD. Oni bezonas pliajn 10 milionojn por estigi du sinkvajn adaptiĝojn promesitajn de la registaro, kiuj konsistigas nur 15 % de la neenspezitaj kontribuantoj el la neformala labormerkato dum la jaro 2000. Estas ja grava devo de la ŝtato, ĉar per la leĝo de 1993, 140 000 pensiuloj estas diskriminaciitaj rilate la tri bazajn kriteriojn: la salajron ricevitan antaŭ pensiigo, aĝon kaj labortempon. Ĝuste la grupo pensiiginta antaŭ la jaro 1993 pli multe kontribuis en formado de la nacia riĉeco, ĉar tiu grupo deĵoris 48 horojn semajne.

### **La rajto de pensiuloj je enspezoj pro privatigo**

La pensiuloj devas ricevi sian parton el la enspezoj akirataj danke al privatigo, kiel okazis jam en aliaj postkomunismaj landoj. Ekzemple, laŭ leĝo pri privatigo en Makedonio ĉirkaŭ 15 % el la fonduso el privatigo transiras al la fonduso de socialaj asekuroj; en Pollando, Hungario kaj Ĉeĥio tio estas 21 %. Se oni komparas Albanion kun Makedonio, en nia lando la fonduso de socialaj asekuroj devus kromenspezi 80 milionojn da USD, 40 % de la aktuala jara buĝeto por pensioj.

### **Malpezigo de ŝarĝoj kaj impostoj**

Rilate al siaj monataj enspezoj, la pensiuloj estas la plej ŝarĝitaj de impostoj. Krome, por la pomalgrandaj prezoj de la varoj de vasta konsumado, inkluzive transporton, la profitnormo estas 18 ĝis 27 %, kelkoble pli alta ol en la aliaj postkomunismaj landoj. Por ĉiu kWh da elektroenergio, pensiulo devas pagi 0,48 lekojn, kaj por ĉiuj 100 telefonaj impulsoj 2,3 lekojn da aldonvalora imposto. Ĉiuj tiuj ŝarĝoj kaj impostoj okupas 27 % de la averaĝa

## **GERMANIO**

# **MMM –**

## **Foira magneto en Manhajmo**

Fine de aprilo kaj komence de majo 2001 la plej granda regiona foiro en Germanio malfermos denove siajn pordojn. La evento ne estas moderntempa inventaĵo, sed radikas fore en la baroka tempo.

La homoj, kiuj en la jaro 1614 en la mallonge antaŭe fondita urbo Mannheim vizitis la unuan „Mannheimer Mai-Markt” (pro tio la sigelo MMM), la „Manhajman Majan Foiron”, nun, post preskaŭ kvarcent jaroj, ne facile orientiĝus en la evento. Ĝi ne plu okazas meze de la urbo, sed antaŭ ĝi, sur aparta grandega tereno. Ankaŭ prezentado de la tiamaĵ fakotemoj kiel nutrado, loĝado, transporto kaj distrado, ŝanĝiĝis funde laŭ la aktualaj strukturoj kaj vivomanieroj. Eĉ por nuntempoj estas ĉiujare renkonteblaj surprizoj kaj mirindaĵoj, ĉar la foiro ne nur proponas kutimaĵojn, sed taksas sin ankaŭ montrejo de la plej aktualaj inventoj kun efemera kaj estonteca signifo.

Dum 11 tagoj, la vizitantojn atendos vendistoj kaj produktoj en tendegoj kaj subĉiele por konsultado kaj rigardado, por tuja aĉeto aŭ mendo post ekzamenado. Estus vane tie ĉi mencii nur la produktogrupojn, ĉar troviĝos preskaŭ ĉiu varo nuntempe vendebla, de la plej eta bezonaĵo ĝis kompleta domo. Aparte fortaj estos la modernaj komunikadaj teknikoj, la turismo kaj ĉiaj motormaŝinoj. Jen

vendos unuopuloj en etaj budoj mallongvivajn kuriozaĵojn; tie en pli pompaj haloj reprezentigos seriozaj regionaj familiaj entreprenoj; en propraj luksaj prezentsalonoj fieros naciaj kaj internaciaj firmaoj.

Proksimume milionduono da vizitantoj frekventis lastajare la ekspoziciejan terenon kaj ĝuis la etoson. Ankaŭ la komercistoj sentis sin, laŭ enketoj, ĉiurilate tre kontentaj.

Krom la vendiga kaj kontaktiga intenco, la foiro proponos ĉiutage apartan distran programon. Grave rolos en tio la loka „Radio Ĉielarko”, sed ankaŭ regionaj kamparanaj organizaĵoj kun multaj bestoj. Allogos aldone multaj rajdaj kaj kaleŝaj konkursoj. Informeme prezentos sin diversaj oficialaj instancoj de la regiono, specife ankaŭ al la junularo. Apud ili la lando Badeno-Virtenbergo montros abunde siajn diversajn fortojn. Memkompreneble ĉiaj restoracioj servos plurloke al la refreŝiĝo de la gastoj inter la komercaj kaj plezurigaj eventoj.

Vizitantoj, kiuj venos sur propraj radoj al la foirejo – nuntempe ankaŭ el pli foraj regionoj, eĉ eksterlandaj – povos parki sur la tereno de la apuda flughaveno.

La Manhajma Maja Foiro 2001 okazos inter la 28a de aprilo kaj la 8a de majo 2001, ĉiutage ekde la 9a ĝis almenaŭ la 19a horo.

RÖSSLER Franz-Georg

pensio. Plue, ili pagas stampimpostojn por ĉiu oficiala dokumento, ili pagas jarimposton por televido, por purigado, por nemovebla havaĵo, ktp. Se oni sumas ĉiujn tiujn, la pensiuloj povas uzi nur 70 % de sia pensio por kovri la materialajn, fiziologiajn kaj medicinajn bezonojn dum la lastaj 15 jaroj de sia vivo. Konklude, estus bone, ke la pensiuloj ne pagu tiajn impostojn, kaj la prezoj devas esti regeblaj de la ŝtato.

### **Pligrandiĝo de repago de kuraciloj kaj kuracaj servoj**

El observitaj 6800 pensiuloj malsa-

naj dum la jaro 1999, 3000 suferas pro mezgravaj malsanoj de stomako kaj renoj. Laŭ demandiloj, ili elspezas 1300 lekojn monate por kuracado (krom tio kion kompensas la ŝtato). 1200 aliaj suferas pro hipertensio, kormalsano kaj diabeto, elspezante monate 1270 lekojn. 1600 aliaj suferas pro gravaj malsanoj kiel kancero k.s., elspezante 1480 lekojn monate. Tiuj elspezoj okupas 20 ĝis 30 % de la monata pensio, kio estas konsiderinda kaj malpliigas la vivdaŭron. La ministrejo pri kuracado kompilis la listojn de kuraciloj kompensataj surbaze de komerca, neniel sociala vidpunkto. Bardhyl SELIMI

## SOCIA JUSTECO

# Eblas alia mondo

**Kun la devizo „Eblas alia mondo” okazis fine de januaro en Porto Alegre, Brazilo, forumo por konsideri kiel elmondigi malriĉecon, militojn kaj maljustecon.**

**P**artoprenis 3000 delegitoj kaj miloj da aktivuloj el pli ol 120 landoj. Ĉi tiu socia forumo kontraŭstaris ekonomian forumon okazantan samtempe en Davos, Svisio.

Grava programero de la forumo estis televida konferenco inter forumistoj en Davos kaj en Porto Alegre. Oni akre debatis: Hebe Bonafini el Argentino argumentis, ke kapitalistoj respondecas pri la morto de milionoj da personoj tra la mondo, ekz. en Afriko, kie bankistoj finance apogas koruptajn registarojn kaj eĉ ŝtat-renversojn.

## Utopieco

Tiuj en Davos multe kritikis la utopiecon de socia justeco, sed finfine devis prezenti sian ekonomian forumon ankaŭ kiel vehiklon de justeco. Tamen statistikoj montras, ke kapitalismo maljustas: en Brazilo la jara nacia buĝeto garantias 72 miliardojn da dolaroj por pagi eksternajn ŝuldojn kaj nur 7 miliardojn por instruado. Plue, la tri plej riĉaj usonanoj havas pli da mono ol 10 % de la tuta homaro.

Diskutataj en Porto Alegre estis ankaŭ i.a. kiel konstrui produktsistemon por ĉiuj; kian internacian komercon oni volas; kiel universaligi homajn rajtojn kaj garantii ekonomiajn riĉecojn; kiel kon-



*Enirsalono de la forumejo.*

strui elteneblajn urbojn; kiel garantii kulturen identecon; kiaj estas la fundamentoj de la demokratio kaj kiamaniere demokratiigi mondan povon.

## Kritikoj

Sed al la forumo ne mankis kritikoj:

la brazila registaro kontraŭis la financon subtenadon de la forumo flanke de la provinca registaro, kiu elspezis entute 470 mil dolarojn. La nacia registaro prisilentis la fakton, ke ĝi elspezis naŭ milionojn da dolaroj por esti reprezentata ĉe ekspozicio en Hanovro, Germanio, kiu nenian profiton rikoltis.



*Marŝo antaŭ la urbestrejo.*



*Provincestro kaj aliaj altranguloj ĉe marŝado.*

# Kiam ĉesas la dancado ...

**E**n Belica, Bulgario, estis malfermita la unua protektejo por ursoj en orienta Eŭropo. Tri ursoj, Mariana, Stefan kaj Kalinka, kiuj scipovas danci, tiel ricevis novan hejmon – parkon por dancursoj, 11 000 km<sup>2</sup> grandan, realigitan de la bestprotekta organizaĵo „Kvar piedetoj” kaj de ties volontulaj helpantoj.

Fine de 1999 oni unuafoje atentigis pri la sorto de la tri dancursoj, kiuj multon suferis pro la artifikoj, kiujn ili devis plenumi, kaj pro siaj vivkondiĉoj. Liberigo de la ursoj kaj revenigo al memstara vivo ne eblis. Laŭ Amir Kalil, gvidanto de la projekto: „La dancursa parko disponigas la plej bonan solvon”.

Bulgario estas unu el la lastaj landoj en Eŭropo, en kiu estas dresataj ursoj por danci kun muzika akompano. Laŭ la ministrejo pri naturmedio en Bulgario vivas ankoraŭ 931 so-

vaĝaj ursoj, kaj 16 estas registritaj kiel dancursoj. Tamen laŭ informoj de bulgaraj ciganoj, kiuj vivtenas sin per prezento de programeroj kun dancursoj, devus esti ankoraŭ 50 dancursoj, kiujn oni ne enkalkulis.


Evgeni GEORGIEV



La bulgaraj dancursoj ricevis novan hejmon en Belica.

Pela Democratização dos meios de comunicação  
**RADIO MUDA 95,5 MHz**  
FM Livre transmitindo no FÓRUM  
*Piratas são eles que querem o eero*

Komunuma radio ...



... kaj ties prizorgantaj.

Okazis la forumo en Porto Alegre, ĉar tie antaŭ 12 jaroj oni lanĉis t.n. partoprenan buĝeton nun adoptitan en ĉ. 200 urboj en Brazilo. Tiel civitanoj rajtas elekti servojn kaj investojn realigotajn de la magistrato por plibonigi la vivon de la plej malriĉaj tavoloj de la socio.

La forumo komenciĝis per „marŝo kontraŭ novliberalismo kaj por la vivo” tra la urbocentro. Invadita estis usona manĝejo: la provinca registaro provis ŝanĝi la itineron de la marŝantoj por protekti kaj la manĝejon kaj hispanan bankon. Okazis ankaŭ koncerto.

José A. PACHECO

Fotoj: José A. Pacheco & Miguel Boeira Vianna



Samseksemuloj protestas.



Per enorma teleron Inga Sartauskaite rajtas senpage manĝi en restoracio en Vilnius tiom, kiom ŝi kapablas meti sur ĝin. La studentino estis la 600 000-a manĝanto en la restoracio, kies posedantoj prezentis al ŝi la teleron. Ĝi havas diametron de 62 cm kaj pezas ĉ. 4 kg.

LAST



# Historio de la ekonomika pensado

## Parto 3

# La klasika ekonomiko

En 1764 la skota filozofo Adam Smith (1723-1790) vizitis la francan urbon Toulouse kaj skribis al sia amiko David Hume: „La vivo, kiun mi vivis en Glasgow estis agrabla, disipa vivo en komparo kun tiu kiun mi nun vivas ĉi tie. Mi komencis skribi libron por forpasigi la tempon.”

**T**io estas la unua aludo pri la verko, kiu eldoniĝis en 1776 sub la titolo *An Inquiry into the Nature and Causes of the Wealth of Nations* (Esploro pri la naturo kaj kaŭzoj de la riĉeco de nacioj, poste: Riĉeco de nacioj). Pro tiu verko Adam Smith estas kutime konsiderata kiel la fondinto de la klasika ekonomika skolo. Tiu skolo floris proksimume cent jarojn. Oni ofte rigardas la irlandanon John Elliot Cairnes (1823-1875) kiel la lastan faman klasikulon. Inter Smith kaj Cairnes ni trovas i.a. la francan Say kaj la britojn Malthus, Ricardo, Torrens, West,

McCulloch, Senior, James Mill kaj lia filo John Stuart Mill.

Kelkaj ecoj estas komunaj por la plimulto de la klasikuloj. Tio koncernas la

interesiĝon pri ekonomia kresko kaj longperspektiva evoluo. Laŭ la plej multaj klasikuloj, sed ne ĉiuj, la ekonomio fine stagnos. Inter la komunaj ecoj estas ankaŭ la interesiĝo pri la disdivido de la nacia produkto inter salajroj, rentoj kaj profitoj. Ni povas mencii ankaŭ la regantan ideon pri la prezoj kiel determinitaj ĉefe de la kostoj de produktado. Alia grava eco estas la liberala sinteno. La klasikuloj havis la ideon, ke troviĝas ia aŭtomata meĥanismo, kiu kuntenas la diversajn partojn de la ekonomio, tiel ke tiu povas evolui kaj funkcii sen multe da ŝtata interveno. Tiu ĉi ideo troviĝis ankaŭ ĉe la fiziokratoj, kaj oni povas distingi ĝin ĉe kelkaj malfruaj merkantilistoj. Tamen, multaj merkantilistoj pledis por ampleksaj ŝtataj intervenoj, kaj tion Smith kritikis en *Riĉeco de nacioj*.

Ni koncentriĝos sur la doktrinon de Smith tia, kia ĝi aperas en *Riĉeco de nacioj*. Smith do estu por ni la ĉefa reprezentanto de la klasikuloj. Al la ceteraj anoj de la skolo ni pro spacomanko donos nur kompletigan rolon.

**'La normala homo laŭ Smith havas pli da ecoj ol egoismon'**

### Adam Smith

Adam Smith naskiĝis en 1723 en Kirkcaldy en Skotlando kaj enmatrikuliĝis jam

en 1737 ĉe la universitato de Glasgow, kie li komence de la 1750aj jaroj fariĝis profesoro.

En 1764 li rezignis pri la katedro por akompani kiel guvernisto junan nobelon al Francio kaj Svislando. Tie li dum periodo estis ofta gasto en la literaturaj salonoj kaj li partoprenis ankaŭ la kunvenojn de la fiziokratoj ĉe Quesnay. La eksterlanda restado daŭris du jarojn kaj dum tiu tempo li komencis verki la libron *Riĉeco de nacioj*. Ni rigardu kelkajn esencajn erojn el ĝia enhavo.

### La ecoj de la homo

La denaskaj ecoj de la homo havas fundamentan signifon por Smith, kiam temas pri lia kompreno pri la funkciado de la socio. Laŭ Smith, tiuj homaj ecoj povas esti iomete modifataj per instruado kaj edukado, sed esence ili devas esti akceptitaj tiaj, kiaj ili origine estis. La institucioj de la socio devas esti formataj el tiu premo.

Kiuj do estas tiuj homaj ecoj? Unue, la homo estas egoisma kaj strebas al plibonigo de sia stato. Tiuj karakteraj trajtoj de la homo povas prosperigi la socion, eĉ se la institucia kadro ne estas la plej favora.

Smith klare konsciis, ke ekzistas esceptoj de la regulo, ke la homo strebas por sia bono. Li diskutas drinkadon kaj diboĉadon. La malŝparemulo estas skurĝata – tiu ja serĉas kontentiĝon nur

por momento. Ankaŭ tiu, kiu obeas al modkapricoj estas bedaŭrinda, sed feliĉe „pro naturaj kaŭzoj, tia stulteco povas etendiĝi nur al malmultaj”.

La normala homo laŭ Smith havas pli da ecoj ol egoismon. Parenca eco estas la „emo negoci kaj interŝanĝi unu objekton kontraŭ alia”. Tio diferencigas la homon de la bestoj. „Neniu iam vidis hundon fari justan kaj intencan interŝanĝon kun alia hundo.”

Apud la homaj inklinoj troviĝas alia grava fakto: origine, homoj estas sufiĉe similaj. Sed la emo negoci kaj interŝanĝi kondukas al specialiĝo kaj metodo de homoj en malsamajn fakojn. Tio pligrandigas la originajn diferencojn.

## La divido de laboro

La emo negoci kaj interŝanĝi estas, laŭ Smith, la fundamenta kaŭzo de la divido de la laboro. Tiu divido siavice kaŭzas, ke la totala produktorezulto estas multe pli granda ol se estus neniu specialiĝo. En la komenco de *Riĉeco de nacioj*, Smith tre apreze priskribas la dividon de la laboro: „Estas la granda multobligo de ĉiaspecaj produktoj, kaŭze de la divido de la laboro, kio en bone regata socio rezultigis tiun universalan prosperon, kiu etendiĝas al la plej maltaj klasoj de la popolo.”

En la fino de *Riĉeco de nacioj* Smith donas multe pli nigran bildon de la divido de laboro: „Kiam la divido de la laboro progresas, la okupoj de la plimulto de tiuj, kiuj vivas de sia laboro, t.e. la plimulto de la popolo, limiĝas al kelkaj tre simplaj manovroj, ofte nur al unu aŭ du. Sed la intelekto de la plej multaj homoj estas necese formata de iliaj ordinaraj okupoj. Homo, kiu pasigis sian tutan vivon farante kelkajn simplajn manovrojn, kies efikoj estas ankaŭ la samaj aŭ preskaŭ la samaj, ne havas okazon ekzerci sian intelekton aŭ ekzerci sian kapablon trovi rimedojn por forigi malfacilaĵojn, kiuj neniam okazas. Tial li, kompreneble, perdadas la kutimon de tia ekzercado, kaj ĝenerale fariĝas tiel stulta kaj nescia kiel estas eble por homa estaĵo.”

En la fino de la libro Smith ne neas la efikon de la divido de la laboro sur la prosperon – kiam la prospero estas mezurita per la kvanto da varoj – sed li enkondukas kroman aspekton: la efikon sur la spiritan kaj korpan staton de la laboristoj.

## La natura libereco

Adam Smith bone konis la pensojn de la filozofoj pri natura juro. Ĉefe de Grotius kaj Pufendorf li estis influita. La

*natura libereco* kaj similaj konceptoj de Smith estas ekzemploj pri tiu influo.

Kion Smith konkrete volis inkludi en la *natura libereco*? Ni havos ideon pri tio, esplorinte en kiuj situacioj tiu aŭ similaj esprimoj aperas. Farinte tion, ni trovas, ke ĝi interalie signifas rajton libere elekti kaj ŝanĝi profesion. Ĝi signifas rajton restadi en tiu paroĥo, kie oni elektis loĝi. Ĝi signifas liberecon komerci kun aliaj landoj, sed ofte la leĝoj faris krimon el tio, kvankam „la naturo neniam intencis tiel”. Ĝi signifas liberecon ankaŭ en la enlanda komerco.

Aliajn ekzemplojn ni trovas en okazoj, kie ne estas dezirinde, ke la natura libereco regu, kvankam ĝi estas eldirite „natura”. Malhelpi al bankisto emisii monbiletojn aŭ al privatuloj akcepti ilin „estas evidenta atenco kontraŭ la natura libereco”. Same estas „la devo konstrui murojn kontraŭ incendio” inter la domoj en urbo. Malgraŭ tio, Smith argumentas, ke en tiaj okazoj limigo de la libereco estas ĝusta, ĉar „tiuj formoj de ies natura libereco, kiuj endanĝerigas la sekurecon de la tuta socio, estas kaj devas esti limigitaj per leĝoj”.

Ni jam vidas, ke Smith ne estis dogmema apologiisto de senlima libereco. Pragmatismo gvidis lin. La *natura libereco* ne estis sankta. En tiuj okazoj, kiam ĝia apliko malutilus al la tutaĵo, Smith postulis limigon. En ceteraj kazoj Smith preskribis, ke la baza regulo estu aplikata, t.e., la *natura libereco* regu. La

## 'En la fino de *Riĉeco de nacioj* Smith donas multe pli nigran bildon de la divido de laboro'

homaj ecoj – strebi al sia propra bono kaj negoci – tiam favorus la kolektivon bonon, malgraŭ tio, ke la unuopaj individuoj agas egoisme.

Ne estas tute klare, ĉu Smith vidis pli profundan, dian intencon en la rilato inter la individua intereso kaj la socia. La ideo pri harmonio inter strebado por propra gajno kaj socia prospero aperis jam en fora tempo. La greka eklezia patro Ioannes Ĥrisostomos (344-407 p.K.) konsideris tiel funkciantan ekonomion kiel parton de dia plano.

## Kion la ŝtato faru kaj ne faru?

La baza ideo de Smith estis, ke la ŝtato intervenu malpli en la ekonomian vivon ol ĝi faris en la tiutempa Britio, kie la merkantilismo estis la reganta ekonomia doktrino. Oni trovas tri ĉefajn argumentojn.

## Navigaciaj Aktoj

La Navigaciaj Aktoj estas leĝoj, kiuj estis farataj de la angla parlamento en la 17a kaj 18a jarcentoj por helpi kaj protekti la anglajn industrion kaj komercon kontraŭ la eksterlanda konkurenco. La origina akto datiĝas de 1651 kaj postulas i.a., ke importado al Anglio okazu per anglaj ŝipoj aŭ ŝipoj de la eksportanta lando. En postaj aldonaj aktoj la komerco de diversaj varoj estas reguligita. La fina nuligo de la Navigaciaj Aktoj okazis en 1849.

Unue Smith kritikis la merkantilismon ĉar ĝi kaŭzis malbone rendimentantan lokadon de la produktadfaktoroj, kaj la privilegioj de la korporacioj kaj la koncesiitaj monopoloj favoris nur unuopajn mastrojn kaj komercistojn je la kosto de la plimulto de la popolo.

La dua argumento, kiun oni ankoraŭ aŭdas en politikaj debatoj, temas pri la kapablo de la ŝtataj organoj detale reguligi la ekonomion por la bono de la popolo.

Trie, Smith rigardis servojn kiel iusencan neproduktivan laboron. La laboro de oficistoj estis tia.

Tio, kion ni diris, ne signifas, ke Smith volis forigi ĉian ŝtatan agadon. La ŝtato havu tri ĉefajn devojn, sed krome ni trovas diversajn aliajn ŝtatintervenojn, kiujn Smith estimas.

La unua ĉefa devo estas protekti la socion kontraŭ atakoj de aliaj socioj, t.e. zorgi pri defendo. La dua devo estas zorgi pri interna ordo kaj juĝado en la lando.

Tiujn du devojn ja havis eĉ pure „noktogardista ŝtato”. Sed per la tria devo Smith foriĝas de tia ŝtato. Temas pri „starigo kaj tenado de tiuj publikaj institucioj, kiuj, kvankam ili povas esti plej avantaĝaj por granda socio, tamen estas de tia naturo, ke la profito neniam povus sufiĉi por repagi la elspezojn al individuo aŭ malgranda nombro da individuoj, kaj pri kiuj oni pro tio ne povas atendi, ke individuo aŭ malgranda nombro da individuoj ilin starigu aŭ tenu”.

La tria ŝtata devo inkludas tiajn utilaĵojn kiel ŝoseojn, havenojn, pontojn, kanalojn, poŝton, edukadon, ktp.

Krom la tri ĉefajn ŝtatajn devojn, oni trovas dise en la libro ankaŭ diversajn ekzemplojn de ŝtataj intervenoj, kiujn

Smith evidente apogas kaj kiuj plifortigas la imagon pri Smith kiel pragmatisto kaj ne kiel dogmema pledanto por *laissez faire*.

Smith apogis la principon pri libera komerco inter la nacioj, sed eĉ tiu ne estis sankta por li. Ekzistas laŭ li okazoj, kiam oni per doganoj kaj aliaj rimedoj apogu la enlandan produktadon. Tiam okazon oni havas, kiam iu branĉo estas necesa por la nacia defendo. Sekve li karakterizas la Navigacian Akton de 1651 - unu el la plej konataj aktoj kontraŭ libera komerco - kiel „eble la plej saĝan el ĉiuj komercaj reguloj en Anglio”. Ĝi garantiis, ke troviĝos lertaj britaj maristoj kaj granda ŝiparo, kiuj estas gravaj por la nacia defendo.

### La sekvantoj de Smith

Smith fariĝis skolkreanto. El liaj sekvantoj en la klasika skolo, Say, Malthus, Ricardo kaj John Stuart Mill estas tiuj klasikuloj, kiuj kune kun Smith havis plej grandan internacian influon.

### Say, franca sekvanto

La franco Jean-Baptiste Say studis la verkon *Riĉeco de nacioj*, de Smith, kiam li estis ĉirkaŭ dudekjara. Dek kvin jarojn poste li publikigis sian propran *Traité d'économie politique* (Traktato pri politika ekonomio, 1803). Tiu ĉi duvoluma verko forte kontribuis al la disvastigo de la ideoj de Smith sur la eŭropa kontinento, kaj pere de angla traduko ankaŭ en Nord-Ameriko.

### Malthus, pesimisto

La anglo Thomas Robert Malthus estis ordinata pastro antaŭ ol li en 1805 fariĝis profesoro pri historio kaj politika ekonomio. Li estas konata precipe pro sia demografia teorio, sed li poste donis gravajn kontribuojn ankaŭ al la cetera ekonomiko.

La plej konata verko de Malthus estas *An Essay on the Principle of Population* (Eseo pri la principo de loĝantaro, 1798). La pesimisma demografia teorio,

kiun li prezentas tie, estis esence apogita de Ricardo kaj Mill. Pli malfrue ĝi estis la bazo por la neomaltusanismo.

La esencon de la eseo ni trovas en kelkaj citaĵoj: „Mi kredas, ke mi povas juste eldiri du postulatojn. Unue, ke nutraĵo estas necesa por la ekzisto de la homo. Due, ke la pasio inter la seksoj estas necesa kaj restos preskaŭ en sia nuna stato.”


Iom poste li diras: „Kiam la popolo estas nebridata, ĝi kreskas laŭ geometria progresio. Vivrimedoj kreskas nur laŭ aritmetika progresio. Iomete kono pri numeroj montras la grandegon de la unua potenco kompare kun la dua.”

Kio rezultas el tio? Ja mizero kaj malvirtoj.

### Ricardo, reputacia

Eble David Ricardo ne estis same epokofara kiel Adam Smith; li ja multe apogis sin sur Smith. Tamen, la reputacio de Ricardo kiel ekonomikisto estas almenaŭ tiel bona kiel la reputacio de Smith pro la sagaceco kaj klareco de lia analizo.

Unu ideo de Ricardo troviĝas preskaŭ neŝanĝita en modernaj lernolibroj pri ekonomiko. Temas pri lia teorio pri kompara avantaĝo en internacia komerco. Ricardo uzas ekzemplon, kie Portugalio estas pli efika ol Anglio kaj en vinoproduktado kaj en ŝtofoproduktado. Li montras, ke malgraŭ tio Anglio povus profiti de specialiĝo pri ŝtofoproduktado, kaj vendi parton de la ŝtofo al Portugalio, dum Portugalio povus profiti de



**La esencon de la eseo ni trovas en kelkaj citaĵoj: „Mi kredas, ke mi povas juste eldiri du postulatojn. Unue, ke nutraĵo estas necesa por la ekzisto de la homo. Due, ke la pasio inter la seksoj estas necesa kaj restos preskaŭ en sia nuna stato.”**

THOMAS ROBERT MALTHUS

specialiĝo pri vinoproduktado, kaj vendi parton de la vino al Anglio.

Unu el la kondiĉoj estas, ke Portugalio estas relative pli supera en la vinoproduktado ol en la ŝtofoproduktado. Eli Heckscher, Bertil Ohlin, Wolfgang Stolper, Paul Samuelson kaj aliaj pluevoluigis en la 20a jarcento la teorion pri kompara avantaĝo, i.a. per enkonduko



Mill, apogeo de la klasika skolo.

de pli da produktfaktoroj ol laboro en la analizo.

### Mill, la apogeo

Per John Stuart Mill la klasika skolo atingis sian apogeon. John Stuart Mill efektive estis filozofo, edukita en scienca pensado jam kiel infano de sia patro James Mill. Li estis elstara reprezentanto de la utilismo, t.e. de doktrino laŭ kiu la agoj de la homo estu gvidataj de la komuna aŭ privata utilo de la agoj.

Lia *On Liberty* (Pri libereco, 1859) multe signifis por la ĝenerala opinio pri parolibereco kaj preslibereco kaj la rilato inter la individuo kaj la ŝtato. La *laissez-faire*-sinteno de Mill estis pli evidenta koncerne opiniesprimojn ol koncerne ekonomiajn kaj socialajn demandojn.


Estas apenaŭ mirige, ke Mill kiel ekonomikisto preferis sufiĉe vastan analizon, kiun enhavas lia *Principles of Political Economy* (Principoj de politika ekonomio, 1848). Eĉ se li, pri pure teoriaj ekonomikaj demandoj, baziĝas ĉefe sur Ricardo, lia cetere vasta socialanalizo pli memorigas pri Smith.

Same kiel la plej multaj aliaj klasikuloj, Mill antaŭvidas estontecon sen ekonomia kresko. Tia stato laŭ Mill ne certe estas malbona. Ĝi povas signifi, ke la homo, liberigita de la penso pri ĉiam kreskanta materia nivelo, trovas trankvilon por pli noblaj celoj.

Bo SANDELIN

Pli ampleksa versio de tiu ĉi serio estos eldonita printempe de la germana eldonejo Leins Verlag sub la titolo „La historio de ekonomika pensado”.

# Unuafoje en Esperantujo



Paĝoj: 106; ilustrita;  
21 cm; kudre bindita;

Prezo: 18,00 €

## Plena monografio pri moderna astronomio

*La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo, akorde kun sia subtitolo (elementa kurso pri astronomio), konsistigas veran manlibron pri teoria kaj praktika astronomio. Skribita de du profesiaj astronomoj (David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel), ĉi tiu konciza verko prezentas tre aktualan bildon pri nuntempa astronomio en lingvaĵo kaj stilo facile komprenebla de ne-fakuloj. Verko blank-nigre ilustrita per desegnaĵoj kaj bildoj, kiuj akompanas kaj klarigas la tekston.*

Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

<http://retbutiko.esperanto.be>

AŬSTRIO

# Pri la aktuala rolo de la religioj

En Vieno fine de la jaro 2000 okazis simpozio „Paco per pacrimedoj”, kiu pritraktis la rolon de la religioj en la moderna mondo. Ĝi estis organizita de Mondkonferenco de la Religioj por Paco (angle: WCRP), Kontaktejo por la Mondreligioj-Vieno kaj Ministrejo pri Eksteraj Rilatoj de Aŭstrio.

La simpozio omaĝis la 30-jaran jubileon de la en 1970 en Kioto, Japanio, fondita WCRP. Dum ties fondkunveno reprezentantoj de la mondreligioj – budhanoj, kristanoj, hinduoj, judoj, konfuceanoj, islamanoj, ŝintoistoj, kaj aliaj – havis por la unua fojo en la historio la deziron kunveni kaj krei movadon de senperforta repaciĝo. WCRP havas la celon stimuli la dialogon kaj kunlaboron de la mondreligioj. Ĝi funkcias kiel unuiĝo de mondreligioj surbaze de honorofica membreco. Tio estas la sola karakterizaĵo de WCRP, kiu distingas ĝin disde la aliaj pacorganizadoj kaj religiaj movadoj. Nun ĝi havas sekciojn en pli ol 100 landoj, kaj la ĉefsidejo estas en Nov-Jorko. WCRP estas agnoskita de UN kiel neregistara organizaĵo.

Dum la inaŭguro la aŭstra kardinalo Franz König [kenig] en sia salutparolo emfazis, ke la mondreligioj devas lasi flanke la demandojn pri prestiĝo, politikajn kaj naciajn kontraŭdirojn kaj sin turni al la ĉefmisio – senco de la homa vivo, demando pri Dio, zorgoj pri la grandaj katastrofoj de la homaro, mondopaco. Krome kardinalo König rememorigis pri la invito de papo Johano Paŭlo la Dua al Assisi la 27an de oktobro 1986, por ke oni tie preĝu kaj per tio atentigu pri la kontribuo de la religioj por la paco en la mondo. La celo de la papo tiam estis, ke la strebo al interreligia dialogo estu ligita kun la preĝo de la religioj por paco. Por la katolika eklezio la renkontiĝo en Assisi krome estis „Ago de pento kaj nova kon-

scio”, ĉar la katolikaj kristanoj mem en la pasinteco ne ĉiam estis packreantoj.

Kardinalo König menciis plue la fakton, ke dum la milito en Bosnio la papo denove akceptis anojn de ĉiuj religioj. Ĉi-foje li emfazis, ke la estimon de la religiaj tradicioj por la homa digno ne eblas forigi. Ĉiuj religioj estis alvokitaj, ke ili defendu sin kontraŭ „etnaj purigoj” kaj militoj, kiel ili ofte estas elprovataj en la nomo de politikaj fortoj lige kun la religio.

La kardinalo nomis la kunlaboron de la katolika eklezio kun WCRP „reciproka strebo”. Li deklaris, ke la kunlaboro de la aŭstria Ministrejo pri Eksteraj Rilatoj kun WCRP kaj la Kontaktejo por la Mondreligioj-Vieno certe kunportos novajn sugestojn kaj impulsojn.

Petrus Bsteh, rektoro de la Afrika-Azia Instituto en Vieno, prezidanto de la aŭstra sekcio de WCRP kaj avidanto de

la Kontaktejo de Mondreligioj-Vieno, substrekiis en sia parolo, ke la religio ĉiam estos reprezenta por la homa digno. Homaj rajtoj neniam povas estiĝi „viktimoj de kvazaŭaj teokratiaj pretendoj”. Samtiel oni devas akcenti, ke la homoj ne devas rezigni pri la postuloj de Dio.

Thomas Buchsbaum [tomas buksbaum], aŭstra diplomato kaj komisiito de la Organizaĵo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (OSKE) emfazis, ke unu el la ĉefaj taskoj de OSKE, en kiu membras 55 ŝtatoj, estas malebligado de perforto. Kiel taskon de la religioj oni vidas ties engaĝon en la antaŭforigo de konfliktoj kaj en la postkonflikta prizorgo.

## Ĉu ekestos mondkonsilio de religioj?

Norbert Klaes, profesoro, eksa pre- ▶



La rolo de la religio en la moderna mondo estis la temo de simpozio en Vieno.



# Realigita revo de la papo

Antaŭ sep jaroj papo Johano Paŭlo la 2a, vizitante Litovion kaj la Monteton de la Krucoj, restis ravita de tiu kruc-amasa sanktejo de la litova popolo. Li diris, ke tiun lokon devus vizitadi tuta Eŭropo. Li volis, ke ĉi tie elkresku monaĥejo. Nun la 47-jaraĝa itala arkitekto Nunzio Rimmaudi enkamigis la revon de papo Johano Paŭlo. Kune kun la antaŭ nelonge forpasinta franciskana arkitekto Angelo Poleselli, apud la Monteto de la Krucoj li projektis franciskan monaĥejon.

Rimmaudi rakontis, ke ekde la jaro 1990 li kunlaboras kun franciskanaj monaĥoj de la itala provinco Toskanio.



Monteto de la Krucoj antaŭ la vizito de la Sankta Patro.



En la jaro 1993, post sia vojaĝo al Litovio, vizitante monaĥejon situantan sur la toskana monto La Verna, papo Johano Paŭlo la 2a eldiris sian deziron, ke Monteto de la Krucoj fariĝu altircentro por la tuta Eŭropo. Tiam naskiĝis la ideo konstrui franciskan monaĥejon kaj tiamaniere kunligi Monteton de la Krucoj en Litovio kun la monto La Verna en Italio. La konstruado de la monaĥejo en Litovio financis Italio. La budĝeto egalas al du milionoj da usonaj dolaroj. Tio permesis uzi ĉi tie plej altkvalitajn konstrumaterialojn, plej modernajn teknologiojn kaj ekipaĵojn. En la nova monaĥejo estis instalitaj eĉ kontraŭtertremaj rimedoj,

kvankam tio ne estas aktuala en Litovio. La ĉefa detalo, kiu venis el la pasinteco kaj estas tipa por ĉiuj franciskanaj monaĥejoj, estas ĝia interna korto.

La itala arkitekto konfesis, ke probable la monaĥejo apud Monteto de la Krucoj estas lia plej bela verko, en kiun li metis sian tutan koron. Krome, tio



La franciskana monaĥejo apud Monteto de la Krucoj (supre). Tipa detalo de franciskanaj monaĥejoj: interna korto (sube).



La itala arkitekto: Nunzio Rimmaudi.

estas lia unua verko en Litovio, sed, espereble, ne la lasta. Antaŭ nelonge en la urbo Kretinga estis inaŭgurita dua konstruaĵo, kiun projektis Nunzio Rimmaudi – la monaĥejo de Sankta Klara. LAST

► zidanto de WCRP-Eŭropo (1983-1999), konstatis, ke la religioj konsidere al la tutmondiĝo evoluigis malrapide „dialogan konscion”. En la sfero de mondskala respondeco kaj solidareco la unuopaj religioj faras multege, tamen kune ili realigas ĉiam ankoraŭ malmulton. Ĉu komuna mondkonsilio de la religioj, kies fondon postulis ĝenerala sekretario de UN Kofi Annan antaŭ 1000 reprezentantoj de la mondreligioj en la konferenco en Nov-Jorko okaze de la nova jarmilo en aŭgusto ĉi-jare, plialtigos la efikecon de la kontraŭ-

batalo de la mondproblemoj, laŭ Klaes ne estas certe.

William Vendley [ŭiliam vendli], nuna ĝenerala sekretario de WCRP, pritraktis laŭ la ekzemplo de intercivitana milito en Siera-Leono la rolon de la religioj en situacio de milito kaj paco. Kiel sekvo de tiu perforta konflikto en la okcident-afrika lando, laŭ iniciato de WCRP estis fondita interreligia konsilio, en kiu partoprenas kristanoj kaj islamanoj. Ĝi ludis gravan rolon kaj kunvenigis ĉe unu tablo la politikajn agantojn (registarĉefo kaj

ribelegvidanto) kaj reprezentanton de la civitana socio en tiu lando. Kontraŭe, la ebloj pri politikaj solvoj restis, nature, tre minimumaj.

Kiel pluaj ekzemploj de la politika rolo de la religioj, dum la simpozio estis pridiskutataj la proksim-orienta pacprocezo, la konflikto en Bosnio kaj la milito en Ĉeĉenio. Ĉe tio komuna opinio de la diskutantoj estis, ke ĉe la menciitaj konfliktoj ne temas pri religiaj militoj, tamen la religi-ideologia elemento de la kontraŭstaro ja estas senduba fakto. Evgeni GEORGIEV

# Sidiĝu kaj tajpu!

Antaŭ deko da jaroj 1993 la aŭtoro prezentis en MONATO artikolon titolitan „Unikodo aŭ unikorno?”. Li iomete dubis pri tio, ĉu la enkonduko de Unikodo aŭtomate solvos ĉiujn skribproblemojn rilate Esperanton sur personaj komputiloj. Intertempe preskaŭ sep jaroj preterpasis – en la komputila mondo jen plurgeneracia tempodaŭro.

**D**o hodiaŭ liveriĝu aktuala kaj preciza respondo pri la eventuala unikorneco de Unikodo. Ĉu ĝi reale iel efektiviĝis, ke oni povas antaŭ hodiaŭa persona komputilo simple sidiĝi kaj tajpi Esperanton?

Sed unuapaŝe kelkaj bazaĵoj. Kodo en komputiko estas interkonsentita ligo de signifoj al specifaj numeroj. Rilate tekston temas pri la ligo de signo – ekz. litero aŭ cifero – al specifa numero, aŭ kodigo, kiel la fakulo prefere formulas tion. Fakte komputiloj traktas nur numerojn kaj scias vere nenion pri alfabetoj. Do ankaŭ datuminterŝanĝe interŝanĝiĝas nur vicoj de numeroj. Se temas pri tekstaj datumoj, estas evidente necese, ke la komunikantoj uzu por la sendado kaj la ricevado komunan kodon.

## Kiom da kodigoj?

Kodigoj povas esti malsame ampleksaj. Ekzemple, dum jaroj kodigoj kun nur 256 kodigoj – do kodigoj de 0 ĝis 255 – estis kutimaj. Tia kodo sufiĉas por enteni la ciferojn de 0 ĝis 9, la anglan alfabeton majuskle kaj minuskle de A ĝis Z, kelkajn interpunkciajn signojn kaj – nun venas la problemo – la supersignajn literojn kaj kelkajn aldonajn specialaĵojn por nur relative malgranda lingvogrupo. Plej ofte temis pri suma spaco por deko da lingvoj. Se oni volis uzi lingvon ekster la deko, oni devis uzi alian kodon por alia lingvodeko. Aliflanke pri kelkaj lingvoj tia 256-kodera kodo plene fiaskis, ĉar la lingvo

nur por si mem bezonas jam milojn da signoj – tiel la ĉina.

La solvon por ĉiuj ĉi problemoj alportis la kodigo Unikodo, kiu jam en sia praformo liveris  $256 \times 256 = 65536$  kodigojn. Hodiaŭ ĝi havas en unu sola kodo spacon por la signaroj de ĉiuj homaj lingvoj – estintaj kaj estantaj. En Unikodo oni jam difinis la kodigojn por la signoj de praktike ĉiuj estantaj lingvoj – inkluzive la ĉinan kaj la japanan. Ĝisdate ankoraŭ ne difiniĝis la kodigoj por la estintaj lingvoj – ekzemple kodigoj por la ĉirkaŭ 5000 antikvaj egiptaj hieroglifoj. Sed eĉ post kiam ĉiuj konataj lingvoj havos siajn difinojn, plu restos libera spaco.

## Ĉu bona feino?

En Unikodo estas ankaŭ difinoj por niaj modestaj bezonoj – nome 12

koderoj por la majusklaĵoj kaj minusklaj supersignaĵoj „ĉ”, „ĝ”, „ĥ”, „ĵ”, „ŝ” kaj „ŭ”. Ĉe tio eble surprizos, ke la esperanta movado mem neniam petis la unikodajn instancojn pri tia inkluzivo. Laŭŝajne iu bona feino simple enmetis niajn signojn, supozeble eĉ ne sciante, por kiu lingvo ili estu. Temis pli probable pri simpla heredaĵo de la du antaŭaj ISO-kodoj por Esperanto – nome ISO 6937 (Teletex) kaj ISO 8859-3 (Latino 3) – kiuj same subtenis Esperanton danke al alia bona feino, supozeble intertempe iomete pli aĝa kaj emeritiĝinta membro de ŝia specio. La vero estas, ke jam en 1980 ekzistis la unua ISO-kodo por Esperanto. Do oficialaj internacie normigitaj kodoj por nia lingvo neniam ajn mankis. Tre bedaŭrinde la esperantistaro nur tre malfrue ekkonsciis pri tio, kaj ĝiaj oficialaj instancoj neniam iel normkomitate okupiĝis pri la enkodigo de Esperanto. La malavano de UEA pri tio estas preskaŭ proverba.

Praktike enuziĝis en Esperantujo plej ofte nenormaj kodoj – ekzemple de Eventoj, de Ĉapelilo. Se entute laŭ normo, laŭ la ĝenerale malbone subtenata kodo Latino 3. Aŭ oni rezignis pri solvo kaj uzis substituajn sensupersignajn kodojn – ekzemple la h-kodon de Zamenhofo aŭ la aĉan iksan kodon, kiu eĉ ĝis hodiaŭ plu hantas kelkajn esperantajn regionojn de Interreto.

Montriĝis, ke mankas ĉe ni forta kaj kompetenta centra instanco por normigi la tuton kaj eĉ – kia vana sopiro! – liveri centran solvon por skribi, presi kaj komuniki la lingvon Esperanto. Rezulte – kiom da esperantistoj, tiom da solvoj, kaj des pli multe da malŝparo de tempo kaj mono por reinventitaj bicikloj. Unue la esperanta tekstotraktilo Ĉapelilo iugrade sukcesis starigi modestan iomete pli komunan bazon, kvankam nur

inter kelkaj centoj da vindaĵoj esperantistoj kun sufiĉe da mono en la monujo.

Ĉe Unikodo statas tamen iomete alie. Unue, ĝi venas al ni donace. Due, ĝi estas ne iu mondfora specife esperanta afereto, sed mond vasta oficiala internacia solvo por ĉiuj

konataj homaj lingvoj. Do Esperanto en ĝi rolas vere nur tute hazarde kaj maksimume dekmilone.

## Ĉu tubero en la afero?

Sed ĉu havi bonan kodon jam solvas ĉion? Ĉu ne eble estas iu tubero en la afero? Fakte komence jes, sed hodiaŭ ne plu. Nome, vere ne sufiĉas simple havi kodon; oni bezonas ankaŭ komputilojn, kaj programojn, kiuj kapablas utiligi ĝin. Aldone oni bezonas tiparojn por tipografie prezenti la signojn de la kodo. Jen la perantoj inter la kodo kaj ekrano aŭ presilo. Ili tradukas la numeron de la kodero en celatan signobildon. Ĝuste ĉio ĉi por Unikodo longdaŭre ankoraŭ ne estis havebla. Nur por Latino 3 oni relative frue disponis almenaŭ pri la plej necesaj rimedoj.

La unua entrepreno, kiu enkondukis grandskale Unikodon en siajn produktojn estis la fifama firmao Mikrosofto. Ĝia mastruma sistemo Vindozo NT estis jam de la komenco unikoda, kaj ankaŭ Vindozo 95 jam kapablis pri ĝi. Tamen vere ĉiuj aspektoj unikodkapablaj estis unue Vindozo 98 kun sia tiame aktuala programaro.

Hodiaŭ praktike ĉio nova de Mikrosofto kapablas pri Unikodo – ekzemple ĉiuj produktoj el la Mikrosofta Oficejo („Microsoft Office”), la krosilo Interreta Esplorilo („Internet Explorer”), kaj la retpoŝtilo/forumilo Aŭtluko Ekspresa („Outlook Express”). Aldoniĝas amaso da senkostaj unikodaj trutajpaj tiparoj, ĉiuj kapablaj pri niaj esperantaj signoj. Cetere, tiu lasta punkto neniel estas memkompreneblaĵo. Nome, ne ĉiu unikoda tiparo havas signobildojn por ĉiuj koderoj; ekzemple, plej ofte mankas la ĉinaj signoj kaj eble ankaŭ la arabaj. Tamen, tre feliĉe niaj esperantaj signoj praktike ĉiam ĉeestas. Do antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis speco de komputila paradizo por Esperanto kaj ties uzantoj.

## Kio pri E-klavaro?

Sed spite al Unikodo restis unu ĝenaĵo. Mikrosofto en sia Vindozo ne disponigas al ni klavaranĝon por klavi la 12 necesajn esperantajn specialaĵojn laŭ la kunliverita Unikodo. Alivorte ne ekzistas specife esperanta klavaro en la vindaĵa medio, kaj verdire difini klavaran aranĝon por esperantistoj estas tikla afero. Ĝi estu ĉiam dorsosake de nacia aranĝo, kiel en aliaj ĉi-platformaj artikoloj jam sufiĉe ofte estis klarigite. Ĉiokaze, kiel ajn oni volas klavi, por atingi akcepteblan kom-


forton necesas aŭ pretigi kelkajn makroojn en la uzotaj vindaĵaj programoj, aŭ, ege pli bone, instali la senkoston programeton „Ek” (atingebla interalie tra la aŭtoro TTT-ejo: <http://come.to/simono>).

Tiu senkosta programeto de Jurio Finkel disponigas ĉiujn popularajn klavadmetodojn por Esperanto (inkluzive la tiel nomatan E-klavaron konatan de Ĉapelilo) kaj – tre grave – kromfunkcie finagordas Vindaĵon por la uzado de Esperanto per Unikodo en ĉiuj vindaĵaj programoj. Tiu fina agordo fakte rilatas al Latino 3 kaj nur nerekte al Unikodo. Ĉiokaze, post la instalo de „Ek” Vindaĵo tute senĝene aŭtomate tradukas inter la 8-bita Latino 3 kaj la 16-bita Unikodo. Jen iomete komplika malfacile klarigebla necesiĝo. Verdire Vindaĵo devas servi samtempe al du malsamaj mondoj – al la nova unikoda, kaj al la malnova ne-unikoda, al kiu okaze de Esperanto apartenas la kodo Latino 3. Efektive estas tiel, ke en Vindaĵo 98 klavaro por Esperanto devas ruliĝi latin-3-e por sukcesi. Tiuj ĉi agordoj pozitive efikas ne nur por tekstotraktaj kaj presaj aferoj, sed ankaŭ por laŭnormaj retpoŝto, TTT kaj forumado. Ĉio ĉi, kion la aŭtoro priskribis, preskaŭ sencime ruliĝas jam de ĉirkaŭ tri jaroj.

## Kiel skani Esperanton?

Parenteze, ankaŭ skani Esperanton ne estas problemo en vindaĵa medio. Por tio taŭgas la jam de pluraj jaroj mond vaste konata tre profesia hungara programo Recognita Plus, kiu kapablas literekkoni ankaŭ esperantajn specialaĵojn. Tiu programo, kvankam eĉ en la aktuala versio 5.0 interne ankoraŭ ne-unikoda, povas senprobleme eksporti la ekkonitan tekston en Unikodo, aŭ post kelkaj agordoj eĉ en ĉapelila kodo, se oni tion preferas. Cetere, elskatole ĝi kapablas pri la nenorma kodo de Eventoj.

Por kompletigi la literekkonan komforton mankas tamen esperanta literumilo por poste traserĉi la skanaĵon pri misskanoj, afero nepre necesa. Unikode tio tamen poste eblas per akompana uzo de la senkosta unikoda redaktilo „UniRed”, same de Jurio Finkel. Tiu entenas potencan esperantan literumilon kaj havas kelkajn vere pintajn pliajn propraĵojn. Simile statas pri la senkosta unikoda redaktilo „Simred” de Klivo, kiu danke al la uzo de la programlingvo Javo ruliĝas ankaŭ en ne-vindaĵaj sistemoj. Memkompreneble ankaŭ la esperanta tekstotraktilo Ĉapelilo konvenas por literume kontroli



la skanaĵon. Ĉapelilo, mem interne ne-unikoda, kapablas poste eksporti la korektitan skanaĵon en Unikodo.

## Ĉu ni ne danku al Mikrosofto?

Koncize, Unikodo en la vindaĵa medio jam de ĉirkaŭ tri jaroj bonege ruliĝas – de la skanilo ĝis la presilo. Ĝi same bone funkcias datuminterŝanĝe inter unikodkapablaj komputiloj kaj en TTT. Ke Unikodo ruliĝas, signifas ĉi-okaze, ke inter multaj aliaj lingvoj ankaŭ Esperanto ruliĝas – nome perfekte supersigne kaj laŭ tre grava internacia normo. Do ĉiuj aktualaj mikrosoftaj vindaĵaj programoj jam kerne kapablas pri Esperanto. Per instalado de „Ek” ĉiu programo ricevas la aliokaze mankantan esperantan klavaron.

Problemoj restas nur ekster la mikrosofta mondo – ekzemple rilate ne-mikrosoftajn krosilojn kaj retroŝtilojn por Vindozo, aŭ programoj baze de aliaj mastrumaj sistemoj kiel Linukso aŭ tiu de Makintoŝo. Ambaŭokaze nur partaj solvoj por Unikodo estas haveblaj, kaj tre bedaŭrinde necesas multe da umado ĉi-medie por eĉ nur parte sukcese. Se hazarde la plej novaj mikrosoftaj produktoj estas en la aliaj medioj haveblaj, kaj iugrade tiel estas, tiuj funkcias ankaŭ unikode kaj sekve taŭgas ankaŭ por Esperanto.

La merkata frakcio de Mikrosofto koncerne komputilojn por oficejlabora kaj hejma uzado estas ĉirkaŭ 80 % ĝis 90 %. Preskaŭ ĉio mikrosofta estas jam unikoda. Do Unikodo restis por ni esperantistoj certe ne iu mita unikorno; male, temas pri jam tre firme establita realaĵo. Danke al Unikodo kaj Vindozo ĉio rilate Esperanton – kaj eble ege pli grave, ĉio rilate centon da aliaj malfortaj lingvoj – funkcias praktike elskatole. Okaze de nia Esperanto ne necesas iel aldone elspezi monon por komputile perfekte uzi ĝin. Evidente „elskatole” signifas ĉi-terene „el mikrosofta skatolo”: fakto, kiun ne ĉiu esperantisto same entuziasme akceptas.

## Ĉu reformi nian alfabeton?

Estas sufiĉe da bonaj kialoj profesie ne uzi mikrosoftaĵojn, kaj certe ne ĉiu povas aĉeti komputilon nur por hejma hobia uzo. Tamen tiuj, kiuj nur pro obstino ne volas uzi mikrosoftajn produktojn por Esperanto, kaj tiaj vere ekzistas, eble konsideru mem liveri la necesajn alternativajn solvojn, anstataŭ iel alie ĉi-terene en niaj revuoj kaj sur la tabloj de niaj libroservoj maksimume stultumi.

Bedaŭrinde kelkaj inter ni elektis la duan vojon, nome maksimume stultumi,

preferante propagandi mortnaskitajn reformalfabetajn projektojn ol serioze okupiĝi pri konvenaj komputilaj solvoj por nia lingvo. Oni fakte eĉ prikalumnias komputilbazajn iniciatojn.

Tipan ekzemplon por tia devojiĝo liveras la „Panoramo de la Universala Skribo” de Jon Walter Yung, alivorte de AEIOU, kies ĉefprotagonisto, la forvaporiginta fantoma tamen UEA-konthava Yannic Gicquel – jen kaŝnome la eks-akademiestro André Albault – jam de jaroj bombadas la aŭtoron de tiu ĉi artikolo per siaj „sidiĵu kaj taĵu”-pamfletoj kaj aliaj NHA-strangaĵoj. Aldoniĝas al tio liaj alirevuaj ataketoj kontraŭ Ĉapelilo – nome pro tio, ke tiu produkto jam en 1995 ebligis eĉ al komputilaj laikoj uzi la zamenhofajn supersignojn en vindaĵaj komputiloj kaj tiel – laŭ li – „baras la progreson de Esperanto”.

Kion diri pri tia stranga aserto? Supozeble iuj Esperanto-stranguloj baldaŭ manifestacios kontraŭ la centrejo de Mikrosofto pro tio, ke ĝi entute enkondukis Unikodon. Ĝuste tiu kulmina kodo nun fine starigas en komputiloj veran lingvan demokration, eĉ por malfortaj lingvoj. Tamen laŭ la albaŭltaj azenaĵoj Unikodo pro la akcidenta kunlivero de niaj supersignaĵoj ne progresigas, sed malprogresigas Esperanton!

Pri lingva demokratio la Esperantomovado babilas jam de jaroj. Ŝajnas, ke malgraŭ tio ĝi plene malkapablas ekkoni lingvan demokration, kiam tiu kvazaŭ enkarniĝas rekte antaŭ ĝia nazo, tamen tute hazarde vestita iomete rigide en helgrize lakita komputilskatola ladlameno.

## Ĉu verko de la diablo?

Ĉiokaze, tiu ĉi artikolo estu jam delonge prokrastiĝinta paŝo celanta iomete remalnodu la tordaĵojn aliloke disvastigitajn kaj eble jam mezurable damaĝintajn la publikan imagon pri la Esperanto-taŭgo de modernaj personaj komputiloj kaj la personkomputila taŭgo de Esperanto. Bedaŭrinde nek ĝenerale la esperantistoj, nek UEA, nek tute speciale niaj akademianoj estas iel ajn avanaj pri komputilaj aferoj. Jam dum dudek jaroj oni ronke tradormis ĉiujn komputilterenajn progresojn, kiuj tuŝis Esperanton. Tio eble okazis iomete laŭ la maksimumo „komputiloj estas la verko de la diablo”. Hodiaŭ ŝajnas regi pli moderna varianto de tio. Estas ne plu komputiloj la verko de la diablo, sed nur la porkomputilaj produktoj de Mikrosofto. Sekve por kelkaj la diablo havas eĉ novan nomon: „Bill Gates”.

Do por la plej obstinaj kontraŭmikrosoftuloj inter ni estus eble konve-

ne kunmencii, ke jam nun estas ekkoneble, ke aliaj produktantoj de komputilaj programoj baldaŭ sekvos la mikrosoftan ekzemplon. Multaj malfruiĝintoj intertempe jam preparas siajn unuajn unikodajn programversiojn, do Mikrosofto ne restos sola kun Unikodo.

## Ĉu solvoj ankaŭ aliloke?

Lastvice estas raportinde, ke pluraj esperantistoj jam okupiĝas pri konvenaj esperantigoj de diversaj partoj de Linukso, do ne ĉiuj estas senfaraj aŭ misfaraj en nia komputila angulo. Aliflanke Vindozo jam de kvin jaroj ricevis sian Ĉapelilon, kaj ekde tri jaroj la giganta Mikrosofto eĉ mem liveras al ni ilaron por Esperanto. Ŝajnas, ke ĉi-momente nur makintoŝe ĉio stagnas.

La vera avantaĝo de Unikodo estas ne la eblo uzi Esperanton, sed la eblo miksi laŭplaĉe plurajn egale kiujn lingvojn en unu sama dokumento per unu sama kodo. Aldone ĝi estas integra parto de la normo XML – normo por produkt-sendepende registri tekston en komputiloj. Nek Unikodo nek XML venis de Mikrosofto, kaj ambaŭ estas iugrade eĉ kontraŭ la intereso de Mikrosofto. Malgraŭ tio Mikrosofto estis la unua entrepreno, kiu ne nur realigis, sed ankaŭ eĉ mondwide disvastigis tiujn nomojn baze de sia produktopaletro.

Ĉiokaze jen la situacio en la unua jaro de la nova jarmilo. Do almenaŭ antaŭ komputilo kun la tre populara vindaĵa mastruma sistemo oni povas hodiaŭ vere simple sidiĝi kaj tajpi – cetere ankaŭ ne instalinte specialan Esperanto-klavaron. Nome oni povas senprobleme elekti la specialajn signojn por Esperanto per la muso rekte en la tekstotraktilo Mikrosofta Virdo („Microsoft Word”). Presi same ne problemas. Posta vizito ĉe esperanta unikoda TTT-ejo helpe de Mikrosofta Interreta Esplorilo („Microsoft Internet Explorer”) montros perfekte ĉiujn supersignojn kaj, se hazarde alvenos unikoda retroŝtaĵo en Esperanto, en Mikrosofta Aŭtluko Ekspresa („Microsoft Outlook Express”) supersigne ĉio same perfektos. Iujn esperantajn adreslistojn oni povas administri per Mikrosofta Ekcelo („Microsoft Excel”). Sen iuj specialaj poresperantaj instaladoj ĉio ĉi tuj funkcias – eĉ en la komputilo de neesperantista najbaro. Evidente tiu eldiro validas nur pri Esperanto en Unikodo, ne pri Esperanto en la nun malaktualiĝinta Latino 3.

Do ni ĝoje ekkriu – iomete libere reinterpretante la sloganon de AEIOU: „Sidiĝu mikrosofto kaj tajpu zamenhofe!”

PEJNO SIMONO

## IRLANDO

# Pli bunta kulturo


Dum la plej longa periodo de la plurjarcenta angla regado de Irlando estis truditaj al la indiĝena loĝantaro kulturo, eklezio kaj lingvo anglaj. Ĉe sendependiĝo, la konstitucio de la nova Libera Ŝtato Irlanda (nun Respubliko) rekonis la irlandan (gaelan) kiel unuan oficialan lingvon, kaj la anglan kiel duan.

**T**amen, ĉar la plimulto de la popolo jam alkutimiĝis al la angla, ĉi tiu iĝis la plej uzata. Hodiaŭ, kvankam kreskas intereso pri la irlanda lingvo, precipe inter la meza klaso en la urboj, la angla estas ĝenerale rigardata kiel pli utila. Frua naciista ambicio pri unulingva gaela nacio ne plu aperas praktika aŭ realisma en epoko de tiel nomata „globismo” (tutmondismo).

Kontraste, en Nord-Irlando, kie la protestanta plimulto rifuzis aliĝi al la Libera Ŝtato, ĝis antaŭnelonge la oficiala uzado de la irlanda lingvo estis efektive malpermesita, ĉar ĝi estis asociita kun respublikismo kaj katolikismo. Do, la indiĝena irlanda lingvo estis instruata nur en katolikaj lernejoj kaj kiel antikvaĵo en universitatoj. Ĉiu el la du komunumoj, respektive, protestanta/porbrita uniista, kaj precipe katolika/irlanda naciista, konservis sian propran apartan kulturon, kiu inkluzivas sportojn, muzikon, tradiciajn dancojn kaj folkloron. La unua komunumo kaj kulturo devenis precipe de kolonioj de sudskotaj presbiterianaj kamparanoj (tiel nomataj *planters*), kiuj estis „plantitaj” de britaj gereĝoj en regionoj el kiuj la indiĝenaj irlandanoj estis elpelitaj kiel trudherboj. Tiuj sudskotoj enkondukis en Nord-Irlando sian malaltejan skotan lingvon, antaŭe nomatan „skotangla”, sed nun pli ĝenerale rigardatan kiel aparta germanida lingvo simile al la angla. Tiu lingvo estis (kaj iugrade ankoraŭ estas) parolata en longa, sed mallarĝa zono, kiu etendiĝas tra la tri plej nordaj graflandoj de Ulstero<sup>1</sup>, nome Dún na nGal (angle: Donegal) en la Respubliko; kaj Doire (Derry) kaj Aontrom (Antrim) en Nord-Irlando. En la resto de Dún na nGal, la lingvoj de la loĝantoj estas la gaela (irlanda) kaj la angla. Kompreneble, la gaela apartenas al tute alia lingva grupo ol la angla, nome la kelta. Alia varianta de la gaela (origi-

nale de irlanda deveno) estas parolata en norda kaj okcidenta Skotlando.

Lastatempe multe ŝanĝiĝis la etoso kaj la publikaj sintenoj, ne nur en Nord-Irlando, sed en la tuta „Verda Insulo”, danke al la pac-iniciato kaj (re)fondiĝo de nordirlanda regiona asembleo, kiu donis pli da aŭtonomio al la tuta loĝantaro. Kune kun la angla, la irlanda lingvo hodiaŭ ricevas almenaŭ iom da oficiala kaj publika rekono en Nord-Irlando, kaj jam estas konstateblaj kelkaj signoj, ke la du komunumoj komencas intermiksiĝi kaj rekoni la diversajn elementojn de kulturo en la insulo kiel komunan heredaĵon. Kompreneble, la skotaj kaj la irlandaj tradicioj kaj kutimoj estas tre similaj, do facile povus harmoniiĝi se la popolo tion bonvole dezirus. Plie, la historiaj ligoj inter Irlando kaj Skotlando ne limiĝas al la menciitaj. Ne nur sudskotoj faris novan hejmon en Nord-Irlando. Dum pasintaj jarcentoj, kiel taktiko por protestantigi Irlandon, la presbiteriana eklezio sendis nordskotajn gaeleparolantajn pastorojn por disvastigi sian formon de la kristana religio inter katolikoj, kiuj tiam parolis dialekton de la irlanda apenaŭ distingeblan de la skotgaela. Supre oni menciis, ke la protestantoj de sudskota origino, tamen, parolis ulsteran (nordirlandan) dialekton de la tiel nomata *Scots*, nomata ankaŭ *Lallans*. Nur relative malgranda nombro da pli maljunaj nordirlandanoj ankoraŭ uzas pli-malpli puran ulsteran skotan kiel ĉiutagan lingvon, sed la insistado de la katolikaj kaj precipe naciista komunumo, ke la irlanda iĝu oficiala lingvo ankaŭ en Nord-Irlando, rememorigis la posteulojn de la sudskotaj koloniistoj, ke ili ankaŭ havas propran lingvon. Tio instigis ilin postuli, ke la nova regiona registaro kaj la registaro de la Irlanda Respubliko agnosku ĝin. Sana kaj bonvena simptomo (inter aliaj) de plibonigitaj interkomunumaj rilatoj en Nord-Irlando



GARBHAN MACAOIDH

*Kovrilo de moderna angla-skota vortaro eldonita en 1993, kredeble la unua kiu traktas la skotan kiel apartan lingvon, kaj ne kiel nuran dialekton de la angla.*

estas tio, ke, laŭŝajne, neniu kontraŭstaras ĉi tion. Novaj centroj por instrui kaj instigi uzadon de la ulstera skota inter plenkreskuloj kaj infanoj estos establita kaj en Nord-Irlando kaj en Donegal (gaela: *Dún na nGal*), la plej norda graflando en la Respubliko (kurioze, la plej norda parto de la irlanda insulo, kvankam politike ĝi estas parto de „suda Irlando”).

La unua el tiuj centroj kaj skotlingva biblioteko jam ekzistas en Nord-Irlando. En ĝiaj agadoj partoprenas ne nur presbiterianaj ulsteraj skotoj sed ankaŭ homoj de tute malsamaj tradicioj, inkluzive de kelkaj irlandlingvanoj. La bibliotekistoj kaj aliaj partoprenantoj de tiu iniciato emfazas, ke lingvo kaj kulturo ne plu devas esti rigardataj kiel religia aŭ politika afero, kiel tio estis en pasinteco. En la biblioteko, la indikiloj kaj ŝildoj estas en la skota; ekzemple, avertilo antaŭ loko kie la plafono malaltiĝas vortumas: *Tak tent o yer* heid, kiu signifas „Atentu al via kapo!”. La sama averto en la angla estus *Mind your head*, dum en la gaela ĝi estus *Aire do do cheann*. Ĉiuj el tiuj versioj estus kompreneblaj kaj en Irlando kaj en Skotlando.

Do, iom konfuze, sed interese, Irlando komencas iĝi kulture kaj lingve pli bunta lando. Parenteze, aldone al tiu malfrua rekono de tri irlandaj lingvoj, la surdula komunumo en Irlando nun postulas, ke ĝia signolingvo, ISL („Irlanda signa lingvo”) estu agnoskita kiel tria oficiala indiĝena lingvo de la Respubliko. Por eĉ pli kompliki la aferon, lastatempe enmigras eksterlandanoj el multaj landoj. La antaŭa relative homogena lando pli kaj pli babeliĝas. Laŭŝajne, en estonteco, kreskaĵoj de ĉiuj koloroj floros en (espereble pacema) verda ĝardeno ...

Garbhan MACAOIDH

1. La irlanda insulo konsistas el kvar provincoj kaj 32 graflandoj (departementoj). Ulstero, kiu konsistas el 9 graflandoj, estas la plej norda provinco. Ses el ĝiaj graflandoj troviĝas en tiel nomata Nord-Irlando, dum tri estas en la Respubliko.

**KANCERO**

# Novaj kuracmetodoj kaj prevento

En 1998 malsaniĝis je kancero ĉ. 10 milionoj da homoj en la mondo. La saman jaron mortis el ili 7,2 milionoj pro manko de optimume frua prognozo kaj sekva terapio.



**P**ri la terapio kaj profilaktiko de kancero diskutis 9000 medicinistoj dum la 10a Eŭropa Kankerkongreso, kiu okazis en Vieno lastseptembre.

Laŭ pritaksoj de la Monda Organizaĵo pri Sano ĉiu sepa homo forpasas pro kancero. Ĝi estas la dua plej granda „mortiganto” inter la ne-infektaj malsanoj post la malsanoj de la koro kaj la sango-cirkulado. La daŭre kreskantaj nombroj de kancero kaj la kaŭzataj de ĝi mortoj estas klarigebaj per la sekvaj faktoroj:

- ▶ plimultiĝo de la loĝantaro,
- ▶ maljuniĝo kaj
- ▶ malĝusta vivstilo.

Laŭ prognozoj de la Monda Organizaĵo pri Sano la nombro de la kancermalsaniĝoj kreskos ĝis la jaro 2020 kaj atingos jare 15 milionojn.

Rilate la vivstilon, la plej grava fak-



**MOS**

## Alkoholaĵo – ĉiam danĝera

Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) en sia lastatempa raporto deklaris, ke la proverbo „ĉiutage unu glason da biero kaj la kuracistoj estos superfluaj” havas nenian sciencan bazon, kaj refoje avertis, ke alkoholo povas kaŭzi la plej gravajn san-problemojn en la mondo. Efektive, en drinkado ne povas esti „sekura kvanto”.

Hodiaŭ, la alkoholo estas la dua „mortiganto” (post la fumado) por la homaro. La kvanto de mortoj kaŭzitaj de alkoholo superas tiun de mortoj kaŭzitaj de narkotaĵoj. Alkoholo povas dependigi la homojn – tio signifas, ke se iu alkutimiĝas al alkoholaĵo, li malfacile liberiĝos de tiu ĉi bezono. Alkoholo mem povas kaŭzi diversajn malsanojn, ekzemple kanceron kaj kronikan hepatiton, kaj krome ebruloj ofte estigas sociajn problemojn.

Fakuloj opinias, ke ne estas prudente rekomendi eĉ „moderan” drinkadon.

Nederlandaj sciencistoj en *British Medical Journal* demonstris, ke la viskio enhavas kancerigan substanco, kaj ju pli supera estas la viskio, des pli granda kvanto da tia substanco estas en ĝi. La substanco, polcikla aromata hidrokarbono, produktiĝas dum la rostado de malto por pretigi post fermentado la viskion. Statistiko montras, ke homoj, kiuj ofte drinkas viskion, estas endanĝerigataj por suferi kancerajn intestan, buŝan kaj gorĝan. **PENG Juan**



**'la alkoholo estas la dua „mortiganto” (post la fumado) por la homaro'**


toro kaŭzanta la plimultiĝon de la kancer-malsaniĝoj, apud kiu ĉiuj cetraj paliĝas, estas la tabakfumado. La sekvoj de la fumado estas tiel gravaj en negativa senco, ke la pulmokancero jam delonge superis nombre la kanceron de stomako, la pasintece plej oftan kancerspecon, kaj nun, kun ĉirkaŭ 1,3 milionoj da viktimoj jare, ĝi staras sur la oka loko de malsanoj, kiuj kaŭzas morton. Pri tio konsentas ĉiuj ekspertoj. „Sekve de fumado en Eŭropo ĉiujare forpasas duonmiliono da homoj: 400 000 viroj kaj 100 000 virinoj”, diris brita epidemiologo Richard Peto.

### Kombinitaj kuracadoj

La mesaĝo de la medicinistoj restas neŝanĝita: „Estas senco rezigni pri la fumado”, diris Peto. „Ankaŭ tiu, kiu antaŭ mezaĝo forlasas fumadon, kaj ĝis tiam ne ekhavis kanceron, evitos la plej grandan parton de la risko.” Ekzemple en Britio la fumado duoniĝis ekde 1970 – kaj en la sama mezuro malpliĝis la nombro de mortintoj pro kancero.

En la pasintaj jaroj en la onkologio ekestis novaj ebloj por kuracado sekve de intensa kombinita apliko de kirurgio, radioterapio kaj kontraŭkanceraj medikamentoj. En la radio-onkologio oni celu loke kreskantajn tumorojn kaj samtempe ne difektu aŭ nur iomete malbonigu sanan histon.

Premiso por la kuracado estas ekzisto de modernaj radioterapiaj centroj. Profesoro Dieter H. Kogelnik el Aŭstrio postulis estigi pli multajn tiajn en Eŭropo kaj opiniis: „Pli bona kvalito en radioterapio povus altigi la procenton de postvivantoj en Eŭropo je 5 %, kaj en orienta Eŭropo je 15 %”.



### Tablojdoj por mamkancero

Dum la kongreso oni pridiskutis novajn kuracmetodojn. Estis prezentita ankaŭ hormon-medikamento kontraŭ mamkancero. Ĉe tiu progresanta malsano eblas apliki la medikamenton *Exemestan* en formo de tavolojdoj. Scienca kontrolo de pacientoj pruvis, ke la progresado de la tumoroj kaj la nombro de la mortoj malpliĝis. Krome ĝis nun oni rutine forigis la limfonodojn el la akseloj.

Nun oni ne faras tion, se la sekva plej proksima limfonodo ne estas tuŝita. Tio



*Mamografio restas unu el la ĉefaj rimedoj por frue konstati kanceron.*

lasas la sanan histon nedifektita kaj reduktas la operaciojn je triono.


Frua ekkono de malgrandaj tumoroj ebligas ankaŭ la kancerkuracadon sen kirurgia apliko. Se oni pliiĝas la radiodozon al la tumoroj, tiu pligrandigos la procenton de la sukcese kuracitaj personoj je 50 %. Krome oni povas eĉ pli intense priadi partojn de la tumoroj, ĉar ili povus esti pli rezistopovaj. Do pliiĝos la tumoroj, ĉe kiuj sen kirurgia operacio povos veni al definitiva kuraco.

Pli indulgaj kirurgio kaj radioterapio povos levi en la sekvaj jaroj la procenton de la sukcesaj kuracoj kaj samtempe konservi la vivon de la kanceraj pacientoj.

Evgeni GEORGIEV



*Pli indulga radioterapio povos estonte levi la kvanton de sukcesaj kuracoj.*



## MEDICINO

# Juneco ŝrumpinta

Sur la foto maldekstre vi vidas 19-jaran litovon Alvydas Gudeliauskas. Sur la apuda foto, avo kun ŝrumpinta vizaĝo estas la sama Alvydas, 26-jara.

**L**a aspekton de kvazaŭ okdekjara maljunulo li akiris dum la tri lastaj jaroj. Hodiaŭ kuracistoj ankoraŭ ne estas certaj, kio kaŭzis lian rapidan maljuniĝon.

Dum la infanaĝo Alvydas ne havis fortan sanon, ofte malsanis. Kiel kvinjarulo li vintre falis en riveron kaj tuj kaptis pneŭmonion. Post kelkaj monatoj la kuracistoj diagnozis tuberkulozon. Dum kvar jaroj oni kuracis lin kontraŭ tiu malsano, kaj fine la kuracistoj konstatis, ke la kuracado estis tro longa kaj la medikamentoj damaĝis la hepaton.

Tuj, do kiam li estis 9-jara, aperis nova diagnozo: aŭtoimuna hepatito. Longe li devis uzi hormonan medikamenton: prednizolonon. La kuracistoj neniam agnoskis, ke la sekvan strangan procezon kaŭzis tiu medikamento. Tamen Alvydas opinias, ke la procezo de maljuniĝo komenciĝis tuj post la ekuzado de prednizolono, do kial supozi, ke damaĝis io alia?

Tuj post la unua dozo li rimarkis etajn ŝrumpojn sur la vizaĝo. Post nova dozo, kiu sekvis post kelkmonata paŭzo, ŝrumpoj iom pli profundiĝis. Sed sur lia foto, kiam 19-jara, la ŝrumpoj estas preskaŭ nerimarkeblaj, kaj same poste, ĝis lia 26-jaraĝo.

Sed tiam li denove malsaniĝis je hepatito. La nova dozo de prednizolono estis tiel granda, ke dum kvin tagoj la

aspekto de la junulo fariĝis tiu de okdekjara avo. La vizaĝhaŭto ŝrumpis, la korpo velkis, ĉesis kreski barbo.

La stranga aspekto de la junulo estis enigmo por kuracistoj. Litovaj medicinistoj esprimis supozon, ke Alvydas malsanas je sindromo de Verner. Tio estas malsano, pro kiu junuloj subite komencas maljuniĝi, falas dentoj, kalviĝas kapo, sekvas blindiĝo, ekstrema maldikiĝo, senforteco kaj finfine morto, ĉirkaŭ la aĝo de 30 jaroj. La litovaj doktoroj klare diris tion al Alvydas. Li sentis sin tre deprimita pro la prognozo.

La junan viron kun tiu stranga mal-

sano rimarkis litovaj gazetoj kaj televido. Post la unuaj artikoloj li ricevis dekelkon da leteroj kun diversaj proponoj kaj receptoj. Ankaŭ amaskomunikiloj en la najbara Rusio multe interesiĝis kaj ofte skribis pri lia kazo. Miloj da leteroj el Rusio invadis la domon de la juna familio. Virino el Ruslando al li skribis, ke en loka preĝejo kuŝas korpo de sanktulo mortinta antaŭ 400 jaroj, tamen tute ne putrinta. Elvenas el la kadavro iu mirakla oleo, per kiu homoj efike kuracas sin de diversaj malsanoj. Ŝi sendis en la koverto peceton da vato trempitan en tiu oleo. Tamen la propono ŝajnis tiom stranga por la familio de Alvydas, ke la juna litovo timis sekvi ĝin.

Alvydas diris ke, se li estus riĉa, li tuj veturus al iu okcidenta kliniko por esplorigi la kialon de sia maljuniĝo, kaj eble tie oni trovus ian metodon de kuracado. Feliĉe, li estis invitita al du programoj de du diversaj televid-kanaloj en Rusio. Post unu el la programoj lin komencis protekti sciencistino, kaj ŝi zorgis pri liaj vizitoj al pluraj klinikoj kaj esplorinstitutoj en Rusio. Alvydas revenis hejmen almenaŭ pli ĝoja, ĉar rusaj spertuloj forte dubis pri la Verner-sindromo. Ili konstatis, ke la organoj de la paciento konvenas al lia biologia aĝo, la problemo estas nur, ke graso ne retenigis en la korpo, sed eliras kun la ŝvito. La esploroj ankoraŭ daŭras.

Alvydas konfesis, ke li estas vivanta en senĉesa deprimado kaj streso. Li brulas pro la deziro plej rapide ekscii la ĝustan diagnozon kaj taŭgan metodon de kuracado. Ja por li estas ege grave, ke la samo ne okazu al lia okjara filino. „Se la proceso de la rapida maljuniĝo haltus, mi povus farigi plastion kaj denove ĝui normalan vivon. Nun ĉio estas en la manoj de fakuloj kaj de Dio”, diris la 27-jara viro, kiu nun estas vaste konata pro sia stranga kaj ege rara malsano.

Laimius STRAŽNICKAS

## Multobla sklerozo – plu mistera

Du novaj esploroj en Lübeck, Germanio, donis novajn konojn pri la kompleksaj procezoj de multobla sklerozo (MS). Esperon ili ne tro vekas, nur iom pli verŝajnigas ian virusan kaŭzecon.

Unu esploro malkovris altan koncentriĝon de Epstein-Barr-virusoj (EBV) ĉe MS-malsanuloj. La alia studo montris kaj komparis la virusan aktivecon de EBV dum unu jaro ĉe pacientoj kun malavantaĝa evoluo (ili jam frue sidas en rulseĝo kaj pene voĉ-parolas) kaj ĉe pacientoj kun leĝera manifestado (eble nur postmorta ekzameno malkovras ke iu suferis de MS).

Surpriza rezulto: 50 elcentoj el la malavantaĝaj pacientoj, sed nur 12 elcentoj de la leĝeraj montris tian aktivecon de EBV. EBV mem eble ne estas malsaniga, certe ne infekta kaj ne heredebila, do la demando pri MS plu restas: kio kaŭzas ke la imuna sistemo lasas tian damaĝiĝon de la korpo? MS plu restas medicina mistero.

M. CZIESLA



# Kloni grandan pandon

La granda pando (*Ailuropoda melanoleuca*) estas ĉarma mamulo vivanta libere nur en Ĉinio. Ĝi estas unu el la krize endanĝerigitaj specioj pro sia malmultiĝo jam ĝis ĉ. 1000.

## Ensemado

Ekde la 60aj jaroj esploristoj uzis artefaritan ensemadon kaj aliajn metodojn por gravedigi kaj reprodukti la grandan pandon. Ĝis la fino de la 80aj jaroj la sukceso estis malgranda. De la fino de la 80aj jaroj ĝis julio de 1997 Chen Dayuan [ĉen dajuan], konsilisto de la Ĉina Komisiono de Reprodukta Tekniko por la Granda Pando kaj profesoro de la Animala Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kun aliaj kolegoj reproduktadis la pandon, uzante la metodon „ambaŭ-seksa regado”, en kiu oni injektas gonadotropinon al pandino por akceli ovolo-maturiĝon, seksardon kaj ovoladon, kaj oni degeligas la frostigitan spermatozoon per nova kultura fluaĵo, por altigi ĝian aktivecon kaj plilongigi ĝian vivtempon. Per la apliko de tiu ĉi metodo 24-foje sukcesis

gravedigo kaj naskigo. Tamen ankaŭ per tiu metodo de „ambaŭseksa regado” oni ne povis ĉesigi la malkreskon de la nombro de la pandoj, ĉar la kvanto de spermatozoj kaj ovoloj de pandoj estas limigitaj.

## Klonado

Por ĝisfunde solvi la problemon, oni devas urĝe plimultiigi la pandojn, kaj la ŝajne plej bona metodo estas uzi klonadon, t.e. senseksan (vegetativan) reproduktan teknikon por „kopii” la pandon.

Oni elprenas unu korpoĉelon el pando kaj enmetas ĝin en senkernigitan ovĉelon de alispeca besto por tiel kreasanan kaj aktivan klonitan pandidon. Tiu ĉi projekto estas unu el la ĉefaj esplorprogramoj de la Ĉina Akademio de

Sciencoj. Nun Profesoro Chen kaj la grupo gvidata de li jam sukcese kulturis pandan korpoĉelon por klonado, kaj per tiu ili komencis provadon de klonado en septembro de 1998. Oni klopodas prilabori sukcesan klonadmetodon dum la venontaj 3-5 jaroj.

Baze de sukcesaj eksperimentoj profazaj por kloni blankan raton, leporon kaj bovon, profesoro Chen Dayuan estas memfida pri la klonado de pando. Sed li diris, ke por kloni pandon estas uzata ksenogena (fremdgena) tekniko, kiu estas pli malfacila ol la homogena klonada tekniko, uzita por klonado de ŝafo en Britio kaj de bovo en Japanio. Ĝis nun tiu tekniko havas nenian sukcesan okazon en la mondo.

PENG Jianjun



# Per tramo tra nia planeda sistemo

La Scienca Semajno, okazigita en 2000 en multaj aŭstraj urboj, allogis milojn da interesitoj. Multifacetaj estis la aranĝoj: „Ne timu teknikon”, „Ĉu vi bone aŭdas?”, „Turkoj en Vieno”, „Lingvo kaj humoro” kaj 350 aliaj. Ne malpli ol 1000 sciencistoj montris, ke scienco estas nek „seka”, nek vivofremda. Plej originalan ideon havis la astronomoj, kiuj montris modelon de nia planeda sistemo en skalo 1 : 2 400 000 000. En la urbocentro, je la finhaltejo de la tramo

41 videblis tabuloj kun informoj pri nia Suno kaj la sunproksimaj planedoj, je la sinsekvaj haltejoj tabuloj pri Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno kaj Plutono. Do oni povis veturi trame tra la planeda sistemo, sed kvazaŭ je 30-obla lumrapideco, kio fizike

ne eblas. Tiel oni vidis, kiel malgrandaj estas la planedoj rilate al la distancoj: en tiu modelo la diametro de nia Tero estas nur 6 milimetroj, sed la distanco al la proksimaj Venuso aŭ Marso estas unu tramhaltejo, do preskaŭ unu kilometro!

Walter KLAG



Haltejo Jupitero

WALTER KLAG



„Kosma tramo” 41



Stando antaŭ la viena universitato.

WALTER KLAG

## FRANCIO

# Plouézec

**Plouézec [pluezek] estas urbeto kun 3250 loĝantoj, kiu situas ĉe la norda marbordo de Bretonio (nord-okcidenta Francio), je 35 km for de St. Briec [sanbrijé] kaj 6 km de Paimpol [pempól].**



*La muelejo Craca en Plouézec.*

**P**louézec havas 17 km longan marbordon, kiu konsistas el akraj klifoj plurajn dekojn da metroj altaj kaj formantaj sovaĝan naturpejzaĝon ĉemaran. Tie kreskas genisto, eriko, ulekso. Konstruado de domoj ne estas permesata laŭlonge de la marbordo.

Malnova vojeto de doganistoj estis antaŭ 25 jaroj larĝigita, kaj laŭ ĝi eblas veturi aŭte. Du ĉefaj altaĵpintoj Bilfot kaj Minard aspektas kiel gardostarantoj, protektantaj la urbon. Sur la rokoj de tiuj pintoj multaj fiŝistoj kaptas fiŝojn: skombroj, labrakoj, krizofrizoj ktp.

Multaj golfetoj kun sablaj aŭ ŝtonetaj plaĝoj permesas banadon, velŝipadon, kolektadon de konkoj dum la malaltaj tajdoj. La plaĝo de Brehek estas nomita la plaĝo de infanoj, ĉar ĝi estas tute sendanĝera. La plaĝo de Porspin havas belajn blujajn ŝtonetojn. Du havenetoj: Port Lazo kaj Brehek ŝirmas multajn ŝipetojn. En Port Lazo oni povas viziti ankaŭ vastan bredejon de ostroj.

La marbordo ĝuas la varman Golfan Fluon, profitas la mildan klimaton, kiu permesas la vegetadon de mimozo, kamelio kaj figoj en la ĝardenoj. Tie la terkulturistoj kultivas frumaturajn legomojn: terpomoj, artiŝokoj, florbrasikoj – ĉiuj vendataj eksterlande pere de vigla aktivado de kooperativo de produktantoj en Paimpol. La plej bela sezono en Bretonio estas la printempo, kiam la orkoloraj genistoj kaj uleksoj „lumigas” la bluan marbordon.

En Plouézec okazas multaj festoj kaj aktivadoj precipe dum la somero. La folkloraj noktodancoj bretonaj, kiuj okazas ofte somere, allogas multajn dancantojn – junajn kaj maljunajn, pluezekanojn kaj gastojn.

Emblemo de Plouézec estas muelejo „Kraka”. Ĝi estis renovigita antaŭ kvin jaroj kaj estas belega vidindaĵo proksime al la maro, precipe kiam la vento funkciigas ĝiajn alojn. Senpagaj vizitoj en la muelejo estas

gvidataj de kelkaj pluezekanoj (ankaŭ en Esperanto).

Plouézec posedas ankaŭ multajn kapeletojn vizitindajn. Krome en ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas fama abatejo de Beauport (je 4 km for), templo de Lanlef (je 10 km), kapelo de Kermaria en Isquit, kun tre fama ludata mortodanco (je 7 km). El la haveno de Paimpol (je 7 km) foriris ĝis 1935 ŝipoj al Islando kaj Novtero por fiŝkapti moruojn.

Fronte al Plouézec en la maro situas la insularo de Brehat, kiun oni atingas post 10 minutoj da ŝipveturo el L'Arcouest. Brehat estas tre konata pro siaj rozkoloraj granitaj rokoj. Je 30 km for de Plouézec estas alia tre bela rozkolora insulo, nomata Perros Guirec.

En Plouézec multaj ĉambroj estas je la dispozo de vizitantoj en la hejmoj de la pluezekanoj. Ekzistas ankaŭ tri kampadejoj – sur la marbordo kaj en la kamparo.

André RIGault

*La pinto de Minard printempe estas rava loko.*

de Hori Yasuo

# Kron-Put

## Vjetnama bambua muzikilo

1

Aŭguston de 1999 mi vojaĝis al Vjetnamio por partopreni en la dua Azia Kongreso. Iun vesperon, promenante en la kongresejo, mi rimarkis, ke multaj gejunuloj kolektiĝas ĉe la akceptejo. Estas ne kutime, ke ni vidas tiel multe da gejunuloj en Esperanto-kunsido en Japanio, do mi tuj decidis paroli kun ili. En la angulo mi trovis kvar gejunulojn babilantajn. Mi alproksimiĝis al ili kaj alparolis:


„Ĉu mi rajtas paroli kun vi?”

„Jes, jes, kun plezuro.”

Ili kun granda ĝojo akceptis min. Mi, sidante inter ili, demandis kelkajn informojn pri ilia rilato kun Esperanto. Mi havis grandan intereson pri kial ili elektis Esperanton, ne la anglan lingvon. Unu junulo respondis, ke nun la angla ŝajnas esti internacia, sed en la estonteco certe Esperanto anstataŭos ĝin. Alia junulino respondis, ke Esperanto disvastigas ŝian kapablon. Alia diris, ke li volas havi amikojn en la mondo. Ili ĉiuj tre pozitive elektis Esperanton kaj ĝuis la etoson de la kongreso. Inter ili estis junulino, kiun mi anonime kaj provizore nomas Hue, la nomo de la antaŭa ĉefurbo de Guen-dinastio. Ŝi estis 25-jara, sed ŝajnis, ke ŝi estas 21-22. Ŝi prezentis sin kiel laboristino. Mi supozis, ke ŝi estas ordinara oficistino aŭ io simila, sed io en ŝi altiris mian atenton.

Poste la gejunuloj invitis min al loka restoracio por manĝi *pho*, vjetnaman lokan nudelon. Ni kvinope vizitis najbaran restoracion. La restoracio estis senporda, por altiri multajn klientojn kaj ankaŭ freŝan venton. Ĉe la enirejo sidis dika virino kun tablo antaŭ si. Sur la tablo troviĝis diversaj ingrediencoj por meti sur nudelojn. Ni okupis longan tablon. Antaŭ ni estis bambuaj bastonetoj enmetitaj en bambua poto. Miaj geamikoj, krokodilante, decidis mendojn. Kelkajn minutojn poste niaj *pho* venis. Mia estis plej luksa kun pecoj de viando sur ĝi. Hue sidis apud mi, kaj tre kompleze prizorgis min, elpreninte bastonetojn el la poto kaj verŝante spicon sur mian *pho*. Ni ĉiuj komencis manĝi, sed dume mia *pho* fariĝis tro pika por mi. Kiam mi plendetis al Hue, ŝi tuj stariĝis, iris al la virino kaj revenis kun nova supo. Ŝi forĵetis mian oranĝkoloran supon kaj plenigis la tason per la nova. Hue ĉiam alparolis al mi per simpla Esperanto, rigardante mian vizaĝon desube. Ŝi estis tiel aminda, ke mi senkonscie alparolis al ŝi:

„Vi estas tre bela kaj ĉarma.”



Ŝi iom honteme respondis: „Ne, mi estas normala.”

La vorto „normala” ne taŭgis al tiu situacio. Ŝi devis uzi vorton „ordinara”. Sed tio ne estis grava. Ni povis kompreni unu la alian. Fakte, ŝi estis „ordinara”. Ŝia vizaĝo estis bruna kaj la buŝo estis iom granda, sed vere ŝi estis ĉarma. Mi ripetis:

„Vi estas ĉarma, vere ĉarma.”

Ŝi ridetis kun sia mano metita sur la buŝo.

Por mia *pho*, miaj gejunuloj pagis. Tre bonkoraj junuloj. Ili ne permesis al mi pagi por ili. Survoje al la hotelo, pro danko, mi aĉetis por ili fruktojn, kiuj similis al budaa kapo. Ilia nomo estas *na*. Ili estis tre oportunaj por manĝi, ĉar oni facile senŝeligas ilin per la fingroj. Hue forĵetis la ŝelojn sur la stratojn. Mi sekvis ŝin laŭ la instruo de proverbo „En Romo faru kiel romanoj faras”. Surstrataj fruktovendistoj, montrante fruktojn en bambua korbo sur biciklo, senŝeligis grandan oranĝsimilan frukton, forĵetante la ŝelojn sur la straton. Meznokte oni kolektis tiujn rubojn kaj matene la stratoj estis senrubaj. Oni eĉ verŝis sur stratojn akvon per akvumaŭto por preventi venton forblovi koton.

Sur la strato infanoj ludis. Ili vestis sin malriĉe, nudpiedaj. Ili ludus „ĉevalon” kaj „pordon”. Ambaŭ ludojn ni, japanoj, havas. Kiam mi provis foti la infanojn, tiuj tuj forkuris disen. Hue kaj ŝia amikino kolektis tiujn kaj mem ludis la ludojn kun ili. Kontraŭ malluma ĉielo Hue ridetis al mi. Kia aminda rideto!

Ĉe la pordo de la hotelo Hue kaj ŝia amikino adiaŭis al mi kaj forrajdis biciklon en mallumon. ▶

► La sekvantan tagon mi sola vizitis Literatur-Templon. Ĝi situis najbare de la hotelo. Ĝi estas fama templo kun malnova historio. En la ĝardeno staris multaj monumentoj, sur kiuj estis engravuritaj nomoj. La nomoj estis tiuj de sukcesintoj en ĉin-devenaj ekzamenoj *kakyo*, kiuj ebligis ilin fariĝi altrangaj oficistoj. Vjetnamio antaŭe estis sub la influo de ĉina kulturo, do ĝi adoptis la ĉinan sistemon. Pro tiu tradicio gestudentoj ofte vizitas la templon por preĝi por sukceso en ekzameno.

En la profundo de la templo estis ĉefa domo kun budaaj statuoj, kaj tie kelkaj muzikistoj ludis vjetnamajn tradiciajn muzikilojn. Viro ludis unukordan *kotoon*. Kelkaj virinoj en vjetnamaj kostumoj ludis bambuan fluton, bambuan ksilofonon, ktp. Mi interesiĝis pri muzikilo, kiu konsistis el dekelkaj dikaj bambuoj kunligitaj horizontale. Juna ludistino ludis ĝin kun sia vizaĝo klinita suben, sendante aeron per siaj ambaŭ manplatoj en la diverslongecajn tubojn de bambuoj. Ŝiaj manoj dancante kreis belegajn sonojn aŭdigantajn *pon-pon*. Kiam mi aŭskultis la muzikon, mi rememoris majon de la jaro 1976.

Memore de la unua datreveno de la venko de la Socialisma Respubliko de Vjetnamio en la Vjetnama Milito, Societo de Laborist-Muzikamantoj en Japanio invitis trupon de muzikistoj kaj dancistoj el Vjetnamio. La trupo vizitis dekelkajn urbojn en Japanio, inter kiuj estis mia urbo. Dum la milito japanaj pacamantoj multe helpis la vjetnaman popolon mone kaj spirite, do la venko estis ne nur ĝojo por la vjetnama popolo, sed ankaŭ nia ĝojo. La koncertoj, ege bonvenigite, sukcesis en ĉiuj urboj kun plenplenaj spektejoj. Tiam mi estis estrarano de la filio de la societo en mia urbo. Mi laboris por aranĝi la koncerton en mia urbo; mi bonvenigis la membrojn ĉe la stacidomo, prizorgis ilin en diversaj aferoj, kaj amikiĝis kun ili. Post la koncerto ni havis bankedon. Ili donacis al ni, la prizorgantoj, *non*, vjetnaman pajlan ĉapon. Dum la bankedo mi petis ilin skribi siajn subskribojn sur mian *non*. Ĝi eĉ nun sidas sur la ŝranko en mia ĉambro kiel memoraĵo de la koncerto.

Rememorante la koncerton, mi atente aŭskultis la muzikon. Kiam la muziko finiĝis, la ludistino levis sian vizaĝon. Surprize ŝi estis Hue. Ŝi ankaŭ surpriziĝis, trovinte min antaŭ ŝi. Kiam ŝi estis en kongresejo, ŝi surmetis pantalonon kaj ordinaran ĉemizon, sed ĉi tie ŝi estis en vjetnama tradicia kostumo, sed ne *aozai*. Ŝi surmetis pale rozkoloran robon kun ruĝa zono. La zono pendis kaj flirtis antaŭ ŝia korpo. Ŝi surmetis bluan tradician ĉapon. Ŝi bele tualetis al si kun ruĝo sur siaj lipoj.

Ŝi laboris kiel muzikistino en tiu ĉi templo dum la tago, kaj dum la libertempo en vespero ŝi venis al la kongresejo por helpi la kongreson. La muzikilo nomiĝis *kron-put*. Ŝi invitis min antaŭ la muzikilon kaj lasis min ludi. Komence mi ne bone faris la sonon, sed iom post iom mi kapablis fari belajn sonojn. Mi parolis al ŝi pri mia memoro pri la trupo, kiu vizitis Japanion antaŭ 23 jaroj. Pli surprize ŝi diris, ke la ludistino de *kron-put* en la trupo eble estis ŝia patrino. Kiam ŝia patrino vizitis Japanion, ŝi estis unujara. Poste ŝi ofte aŭdis pri la vojaĝo, koncertoj kaj bonkoreco de japanoj. Ŝia patrino trezoras la fotojn faritajn kaj donacojn ricevitajn en Japanio.

Post kiam Hue kreskis, ŝi sekvis la saman vojon kiel ŝia patrino. Nun ŝi estas muzikistino de *kron-put* kaj staris antaŭ mi. Mi ne rememoris vizaĝon de *kron-put*-ludistino en la trupo, sed mi bone memoris belajn muzikistinojn en kolorriĉa *aozai*. Post la trovo de filino de tiama *kron-put*-ludistino, Vjetnamio fariĝis pli

familiara lando. Mi aĉetis *kron-put*, paginte sepdek usonajn dolarojn, kiel grandan memoraĵon.

Kiam ni adiaŭis, ni promesis rendevui ĉe nia hotelo tiuvespere.

Kune vespermanĝis ni en restoracio en malnova urbo apud la lageto. Ĝi estis tre bona restoracio, kie oni ofertis al ni tre bongustan vjetnaman manĝaĵon. Post tio ni revenis al mia hotelo. Mi invitis ŝin al mia ĉambro, por ke mi povu sonbendigi ŝian kanton. En la restoracio, ŝi montris sian kajeron al mi. En Vjetnamio Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj estas tiel multekostaj kaj nesufiĉaj, ke kursanoj mem kopias tiujn. Ili ĉiam portas sian propran kajeron por skribi ĉion necesan pri Esperanto. Ankaŭ Hue, de tempo al tempo, petis min skribi vortojn kaj frazojn ne familiarajn en ŝian kajeron. Tiam foliumante ŝian kajeron, mi trovis kanton en Esperanto. Ŝi kantis ĝin mallaŭte en la restoracio. Mi ŝatis ĝin kaj volis sonbendigi ĝin.

En mia hotelĉambro, komence mi ludis *ŝakuhaĉi*, japanan tradician bambuan vertikalan fluton. Delonge mi lernas la muzikilon kaj ĉiam kunportas ĝin. Mi ludis japanan melodion „La Luno super Ruina Kastelo” kaj poste kantis ĝin. Poste ŝi kantis al mi kanton titolitan „Sur la Ponto”, kiu estis en ŝia kajero. Tiu estis amkanto de junulino. Vjetnama melodio kun simpla, sed emocia poemo.

### Trans la ponto

1. Al vi mi donos mian jakon.

Mensoge mi diros al paĉjo, panjo,  
ke trans la ponto, ke trans la ponto,  
Vento forblovis ĝin, Vento forblovis ĝin.

2. Al vi mi donos mian ringon.

Mensoge mi diros al paĉjo, panjo,  
ke trans la ponto, ke trans la ponto,  
Ondo forportis ĝin, Ondo forportis ĝin.

3. Al vi mi donos mian ĉapon.

Mensoge mi diros al paĉjo, panjo,  
ke trans la ponto, ke trans la ponto,  
Vento forblovis ĝin, Vento forblovis ĝin.

Ŝi kantis bele. Ŝi estis lerta ne nur en *kron-put*, sed ankaŭ en kantado. Ŝi studis muzikon en hanoja Arta Universitato. Estis nature, ke ŝi havis bonan voĉon kaj kantis bele. Mi elprenis japanan kantlibron el mia valizo, kaj responde kantis al ŝi aliajn japanajn kantojn. Ĉar longjare mi apartenis al la Koruso de Naŭa Simfonio de Beethoven en mia urbo, mi iom fieris pri mia voĉo. Kiam mi vojaĝas al eksterlando, mi ĉiam kunportas japanan kantlibron, por ke mi ĉie povu kanti laŭ la peto de miaj amikoj.

Ŝi rimarkigis al mi, ke mi aĉetis *kron-put* el la sako, muntis kaj starigis ĝin antaŭ ŝi. Ŝi ludis por mi! Rigardante kantlibron, ŝi ludis japanajn melodiojn per *kron-put*, kaj kune mi kantis. Ŝi eĉ ludis *ŝakuhaĉi*. En ŝia universitato studentoj devas lerni ĉiujn tradiciajn muzikilojn. En la templo ŝi ankaŭ ludas vjetnaman bambuan fluton. Se oni ludas unu specon de fluto, oni relative facile povas ludi alian. Ni kantis, ludis kaj ludis kune ĝis malfrua vespero. Japana bambuo kaj vjetnama bambuo kreis dolĉajn melodiojn kaj harmonion. Interŝanĝo de muziko faris nin nedisigeble intimaj.

Kiam ni adiaŭis ŝin, mi diris al ŝi:

„Morgaŭ mi partoprenos en la postkongreso al ►

► Danang kaj Hue. Mi revenos al Hanoj en la 30a, do nepre vizitu min en la hotelo." La sekvantan tagon mi ekvojaĝis. Mia vojaĝo estis tre interesa kun multaj vidindaĵoj, kaj mi multe ĝuis ĝin. Sed dum la tagoj mi ĉiam pensis pri Hue. Mi ĉiam rememoris ŝiajn ridetojn, ŝiajn gestojn, ŝiajn kantojn kaj ŝian *kron-put*. Mi estis tre senpacienca revidi ŝin.

Je la planita horo en la 30a ni revenis al Hanojo. Vjetnamaj samideanoj atendis nin en la hotelo. Amikinoj de Hue venis. Sed ne Hue. Dum mi parolis kun miaj amikoj, mi rigardadis la pordon de la hotelo. Mi parolis, sed fakte mi ne parolis. Mi atendis ŝin. Fine por mia bedaŭro, venis la tempo, kiam ni devis ekiri al restoracio por vespermanĝi. Ni enbusiĝis. Mi rigardadis eksteren ĝis la lasta momento. Sed vane. Mi demandis de ŝiaj amikoj, sed neniu sciis, kial ŝi malfruiĝas. Neniu sciis ŝian telefonnumeron. En restoracio dum mi manĝis, mi estis malfeliĉa. Ĉu iu akcidento okazis al ŝi? La vesperon antaŭ ol ni ekiris, subite ekventegis kaj pluvegis. Ĉu la malbona vetero malhelpis ŝin?

Ni revenis al la hotelo. Kiam mi restis en mia ĉambro, aŭdiĝis frapoj ĉe la pordo. Ĉu Hue. Ne. Venis kelnero. Li transdonis al mi saketon. Mi malfermis ĝin. Ĝi estis donaco kaj letero de Hue. La letero diris al mi:

„Mi atendis vin unu horon, sed vi ne revenis. Ĉu vi forgesis min, ĉar mi estas komencanto de Esperanto?”

Mi kriis en mia koro: „Ne, tute ne! Mi neniam forgesos vin! Pro tia stulta kialo mi neniam forgesos vin! Sed kial vi malfruiĝis?”

Ŝia donaco estis malgrandaj lignaj rozfloroj en eta vazo, kaj flava, malgranda frukto. La frukto havis tre bonan odoron. Mi flaris ĝin foje. Mi metis ĝin foje. Mi metis ĝin sur la tablon. La bona odoro plenigis la ĉambron.

La sekvanta tago estis mia adiaŭa tago al Vjetnamio. Japanaj grupanoj veturis al flughaveno. Vjetnamaj

samideanoj kune venis, sed ankaŭ tiun ĉi fojon Hue ne venis. Atendante la pasportokontrolon, mi ĉiam rigardis eksteren, sed vane. Ŝi ne aperis. Malfeliĉa mi adiaŭis al Hanojo.

## 4

Unu semajnon post mia reveno al hejmo, letero de Hue venis. En ĝi ŝi skribis:

„Mi ne povis iri al flughaveno, ĉar mi havis malvarmumon. Mi tre bedaŭras tion.”

Nun, mi komprenis. Mi povis imagi Hue en la pluvego de la 30a. Ŝi rajdis biciklon. Kvankam ŝi surmetis pluvmantelon, vento kaj pluvo estis tiel fortaj, ke la pluvmantelo ne bone protektis ŝin. Ŝi hastis al la pordo de la hotelo. Sed mi jam forveturis. Ŝi sola atendis min, sidante sur la sofo en la halo. Ŝi estis malseka de kapo ĝis piedoj pro la pluvo. Ŝia nigra hararo pli nigriĝis pro la pluvo. Ŝi tremis de malvarmo, kaj post unu horo ŝi revenis al sia hejmo. Ĉu ankoraŭ pluvis tiam? Jes. Ŝi revenis hejmen denove tra la pluvo kun malesperiĝo. Mi responde skribis leteron al ŝi, esprimante mian bedaŭron ne vidi ŝin. Post du semajnoj ŝia respondo alvenis. Ŝi skribis pri inundo, kiu atakis Vjetnamion, kaj ĉe la fino ŝi simple skribis „Same kun vi”. Tre simpla, sed mi komprenis.

En la inaŭgura ceremonio de la Kongreso, la prezidento de KAEM alparolis al partoprenantoj, dirante, ke dum la kongreso ni ne nur amikiĝu, sed ankaŭ amu unu la alian. Mi aŭskultis la paroladon kun mokrido, sed post la semajna kongreso, mi amis vjetnaman junulinon, pravigante lin. Esperanto, por mi, estis ilo por homamo inter popoloj, sed mi tute ne supozis, ke Esperanto estos ilo por privata amo por mi. Amo inter Hue kaj mi. ■


# Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo.

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.

**Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:**  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
Prezo: 9 EUR (plus afranko).

*Se vi mendos 3 ekzemplerojn, vi ricevos kvaran senpage!*

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



# Pri homeopatio simple kaj trafe

Libro pri homeopatio en Esperanto aspektas kiel simpatia kombino. Ĉar, se nia mondo de komplikaj komunik-problemoj nepre bezonas la simplan solvon de la Internacia Lingvo, same la medicina mondo de kompleksega (kaj multekosta, iufoje nehumana) teknologio nepre bezonas la helpon de homeopatio. Kaj se al la esperanta fakliteraturo utilas riĉiĝo per verko kiel *Homeopatio Populara*, same al la homeopatia movado utilas tutmonda disvastiĝo per la Internacia Lingvo.

Homeopatio estas kuracmetodo kreita de Hahnemann antaŭ pli ol 200 jaroj, sed ĝis nun ne sufiĉe utiligata por la bono de malsanuloj. Malgraŭ pluraj indikoj, niaj karteziaj sciencistoj ankoraŭ antaŭjuĝas ĝin kiel senefikan. Tamen, eĉ prestiĝaj medicinrevuoj (ekzemple, ĉi-jare en Anglio) jam publikigis seriozajn esplorojn, kiuj demonstras ĝian efikon – kio igas onin supozi, ke malantaŭ tiaj antaŭjuĝoj kuŝas, eble, ekonomiaj interesoj.

Iel ajn, libermensaj homoj devus studi la aferon kaj provi ĝin. Temas ja pri kampo, kie empirio pleje valoras.

La libro havas la grandan meriton prezenti la bazajn informojn pri homeopatio per simpla kaj trafa lingvaĵo, tute komprenebla eĉ al nefakulo. La aŭtoro komentas la faman principon *Similia similibus curantur* (Similojn kuracas similoj), la vidpunkton de homeopatio pri pluraj oftaj sanproblemoj, kaj indikas plej ofte uzatajn medikamentojn kontraŭ plej ordinaraj malsanoj. Fine, oni listigas kuracilojn uzeblajn sen konsulti kuraciston. Kompreneble, kuracistoj kaj aliaj fakuloj pri sano trovos la informojn tro resumaj – jen do sugesto, ke la aŭtoro dediĉu sin al alia, porfakula verko.

Se la celo de ĉi tiu verko ne estus disponigi mallongajn praktikajn informojn al pacientoj mem, oni povus bedaŭri, ke la aŭtoro ne enmetis kelkajn liniojn pri la belega biografio de Hahnemann, pri la kvar fundamentoj de homeopatio (leĝo de simileco, eksperimentado en sana homo, unuopaj dozoj kaj diluado/dinamizado de la medikamentoj – el kiuj nur la unuaj du estis supraĵe klarigitaj), kaj pri aliaj kuracistoj, kiuj kontribuis al tiu metodo, post Hahnemann. Kaj ĉar eĉ pacientoj scias pri la ekzisto de malsamaj homeopatiaj skoloj (tiu, kiu de-



fendas la uzadon de po unusola medikamento kaj tiu por po pluraj medikamentoj), tial eble estus utile klarigi al nefakuloj la argumentojn de ambaŭ. Krome, certe interesus la ĝeneralan publikon koncizaj konsideroj pri du esencaj konceptoj de homeopatia doktrino: la „vitala forto” kaj la vera, profunda senco de resaniĝo (korpa, men-

sa kaj spirita reekvilibrigo). Sed mi komprenas, ke tiaj aldonaĵoj komplikus la verkon, kiu ĉefe celas simplecon kaj trafecon.

La eldono estas portugallingva kaj esperanta. La tradukintoj faris seriozan laboron kaj mi kompatas ilin, kiam ili devis alfronti la esprimon *Materia Medica*; la solvo „medikamentaj lernobjektoj” miskomprenigas la ideon, kiu fakte temas pri listo de medikamentoj kun la koncernaj simptomoj. Al mi ŝajnas, ke oni devus lasi la terminon en la latina lingvo, laŭ kiu ĝi estas internacie konata, kaj aldoni noton, por klarigo. Cetere la teksto estas tute klara, kaj disaj preseraroj (eĉ sur la dua kovrilo) ne kompromitas la enhavon. Leginda, hejme havinda, disvastiginda, gratulinda verketo.

Paulo Sergio VIANA

Izao Cameiro Soares: *Homeopatia Populara/ Homeopatia Populara*. Dulingva (portugala kaj esperanta). En Esperanton tradukis Neusa Priscotin Mendes, Amilton Jorge da Costa Reis, Edmea Marturano Villela. Eld. Conhecimento Editorial Ltda, Brazilo, 2000, 96 paĝoj broŝuritaj. ISBN 85-87619-12-8. Prezo ĉe FEL: 8,60 eŭroj + afranko.

## Tiel okazis, tiel mi spertis

Tre bone verkita kaj interesa kolekto de 15 novel(et)oj, origine verkita en Esperanto. Kelkajn el ili mi jam antaŭe legis, kiel juĝisto en la Belartaj Konkursoj de UEA, kaj aljuĝis al ili la unuan premion. Min plezurigas, ke FEL samopinias kun mi pri la literatura valoro de la verkoj de ĉi tiu aŭtoro.

Lena Karpunina dum la plejparto de sia vivo loĝis en Taĝikio, iama parto de Sovetunio sed nun sendependa lando. Pluraj el la noveloj priskribas eventojn el ŝia infanaĝo, ĉu aŭtobiografiajn, ĉu tipajn por tiu periodo. Ĉiam sen kondamno kaj sen apologio, simple kiel „tiel okazis, tiel mi spertis, tiel oni vivis, tiel estis nature”. Tial la noveloj havas freŝan karakteron kaj nutras la spiriton de la leganto, sen la politikemo, kiu ofte karakterizas tiatemajn kaj tialokajn verkojn.

La komprenemo kaj la honesteco de la verkinto brilas en ĉi tiuj noveloj.

La stilo de Lena Karpunina estas klara kaj plaĉa, nek tre komplikohava nek simpligita, sed klasikesperanta. Ankaŭ la vortoprovizo estas tiu de bona verkisto, nek tro simpla nek tro neologismoplena. Gramatike la verko estas senriproĉa.

Tre rekomendata legaĵo, bona kontribuo al la Esperanta literaturo.

Donald BROADRIBB

Lena Karpunina: *La Bato*. Serio Stafeto n-ro 26. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2000. 125 paĝoj glue broŝuritaj. ISBN 90-71205-87-8. Prezo ĉe FEL (retbutiko.esperanto.be): 12,00 eŭroj + afranko.



## Granda vojaĝo kun malgranda gvidlibro

Kiam vi planas vojaĝi al alia urbo aŭ eksterlanden, vi komencas serĉi gvidlibron. Tre ofte oni ne sukcesas trovi la bonan: iu estas tro triviala, iu ne havas bildojn, iu jam malnoviĝis. Aliflanke, ankaŭ kiam vi deziras akompani tra via urbo eksterlandajn amikojn, vi bezonas gvidlibron. *Malgranda gvidlibro pri Moskvo* perfekte taŭgas kaj por turistoj kaj por moskvanoj.

En la libro vi memkompreneble trovos priskribojn de moskvaj vidindaĵoj. Se vi jam vidis (eĉ plurfoje) la Moskvan Kremlo, la Ruĝan placon kaj la straton Arbat, vi povos elekti aliajn interesajn vojplanojn. La aŭtoroj konsilas, kien iri kaj kion rigardi.

Certe, ĉiu vojaĝanto dezirus havi gvidlibron en sia gepatra lingvo. Samtempe la plej bonaj priskriboj de urbo estas kreitaj de la indigenoj en la loka lingvo. Tial estas bonege, ke *Malgranda gvidlibro pri Moskvo* estas verkita de moskvanoj en Esperanto. Ni aparte rimarkigas, ke en tiu ĉi libreto esperantisto trovos tion, kion li ne povas ekscii el ordinaraj gvidlibroj: informojn pri lokoj, ligitaj kun la antaŭa kaj nuna historio de Esperanto.

Traleĝinte tiun ĉi verkon, ĉiu povos saĝe aranĝi sian moskvan vojaĝon. Tre grave estas decidi, kiujn muzeojn kaj lokojn el grandega multo oni nepre devas ekvidi kaj kiuj atendu ĝis sekvantaj fojoj. La libro donas negrandan liston de „videndaĵoj” – stratoj, placoj, domoj – kaj sufiĉe detale priskribas sep muzeojn.

Se vizitanto havas pli multe da tempo, li povas pririgardi belegajn apudmoskvajn bienojn, ankaŭ pri kiuj rakontas la libro. Ili estas ĉefverkoj de rusa arkitekturo, situas en tre belaj lokoj, muzeoj en eksbienoj posedas riĉajn kolektojn de pentraĵoj kaj artaĵoj.

Por tiuj, kiuj jam konas Moskvon, la libreto proponas vojaĝon al apudmoskvaj urboj. Estas tre oportune, ke la aŭtoroj indikas, kiel atingi la urbojn kaj kiom da tempo forprenas la vojo.

Krom priskriboj de vidindaĵoj, la gvidlibro enhavas faktojn pri geografia situo kaj historio de Moskvo, kelkajn informojn pri arkitekturaj stiloj en Rusio. La aŭtoroj montras, kiel ŝanĝiĝis arkitekturaj fluoj en Moskvo, kiuj trajtoj estas tipaj por diversaj stiloj. Ankaŭ la ĉapitro pri rusaj preĝejoj estas tre interesa (ĝi klarigas, ekzemple, la kanonan ordon de ikonoj en ikonostazo). Krome, tiu informo taŭgos dum vizitado de baziliko en monaĥejoj, pri la plej famaj el kiuj temas en aparta ĉapitro.

Por eksterlandanoj utilas konsiloj pri tio, kiel uzi metroon, telefoni, ŝanĝi monon kaj aĉeti ion en Moskvo. La gvidlibro havas ankaŭ ĉapitreton pri la rusa alfabeto kaj prononco kun malgranda frazaro por turistoj. Interalie, ruslingvanoj povas amuziĝi, divenante rusajn nomojn, kaŝitajn en la esperantaj, ekzemple: Armila Ĉambro – *Oruĝejnaja palata*, Triunuo – *Troica*.

Oni tre facile kaj kun plezuro traleĝas la libron, sed ĝiajn bildojn oni pririgardas ne tre komforte. La gvidlibro enhavas multe da bone selektitaj fotoj, tamen, bedaŭrinde, ne ĉiuj estas sukcese reproduktitaj. Restas alveni al Moskvo kaj ekvidi ĉion per propraj okuloj.

Sendube, *Malgranda gvidlibro pri Moskvo* helpas al moskvanoj esti bonaj gvidistoj tra la urbo kaj permesos al aliurbanoj ĝui (eĉ memstaran) ĉeeston en Moskvo.

Anna kaj Mati PENTUS

Nikolao Gudskov, Natalia Aroloviĉ: *Malgranda gvidlibro pri Moskvo*. Eld. Impeto, Moskvo, 2000. 88 paĝoj glue binditaj. ISBN 5-7161-0071-6.

# Kiel la afero Jesuo rilatas al la Judoj?




Pri tio ekzistas du respondoj, unu pozitiva kaj unu negativa. La pozitiva estas, ke Jesuo kaj liaj unuaj adeptoj estis kaj restis Judoj. Tial la komencon de la Kristanismo ni devas kompreni el la Judismo. La negativa respondo estas, ke poste la Kristanoj sin apartigis kaj ekrigardis la Judojn kiel malamikojn. Ili opiniis eĉ ke tio estis la intenco de Jesuo. De tiam esti Kristano ŝajnis egali kontraŭ-Judismon. Pro ĉi-ambaŭ kialoj ni ne povas preparoli Jesuon aparte de la Judoj.

Paĝoj: 158; ilustrita; 21 cm; kudre bindita;  
Prezo: 11,00 €

Informoj:  
tlf. +32 3 234 34 00;  
tlk. +32 3 233 54 33;  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

# Nova verktalentulo



Gersi Alfredo Bays ĝis nun estas plej konata kiel la fonto de *Fonto*, kaj la eldonejo kaj la revuo. Sed per ĉi tiu verko, li montras sin ankaŭ tre bona rakontisto. „Rakontisto”, pli ĝuste ol „romanisto”, ĉar

la verko efektive konsistas el aro da plimalpli sendependaj epizodoj, kun konstanta rolantaro, do estas facile legata dum pluraj sidoj, sen perdi la fadenon de la rakonto. Kaj tiu rakonto estas tre ĝuige, kelkfoje brile, prezentata al ni.

La vorto *pedras* signifas „ŝtonoj”, sed ĉi-rakonte temas pri vilaĝeto en la forforejo de la landinterno de Brazilo. La epoko estas la 1930aj, kaj la etoso estas tre aŭtentika. Evidente, Gersi Alfredo Bays tre sukcese ĉerpis el siaj memoroj pri tiu epoko, kaj redonis al ni ties guston. Tio ne signifas, ke temas pri aŭtobiografia verko. Sed ja la talento de vera rakontisto estas kredigi al ni, ke vere okazis la prirakontaĵo, ĉu ne? Nu, ni facile kredas al la rakontaĵoj de Bays.

Laŭ la rakonto, brazila juda arkitekto, kies patro estis murdita (jes ja, la naziemo ankaŭ en Brazilo ne estis plene nekonata, tiuepoke), decidas konstrui por si novan vivon en nova loko, tre for de la urbocivilizacio. La vilaĝeto Pedras estas tre taŭga por tio, kaj la arkitekto, kiun oni kromnomas Profeto – pro lia iom sovaĝa aspekto –, en tre malfacile atingebla loko apud Pedras konstruas por si „kasteleton”. Baldaŭ venas loĝi kun li eksinstruistino Luiza, kiu ankaŭ bezonas fuĝi de sia pasinteco. Kaj monatojn poste venas loĝi kun ili tria persono, junulino, kiu bezonegas malaperi de sia familio.

Profeto – tiu kromnomo fariĝis lia kutima, eĉ preskaŭserioza nomo – estas tre talenta viro, bone edukita. Kune kun sia kvazaŭedzino Luiza, li multe helpas la pedrasanojn, kaj ili fariĝas liaj intimaj amikoj. Pri la vivo en Pedras ni abunde legas; ĉiam en la kadro de epizodoj, kelkfoje amuzaj, kelkfoje tragikaj, kelkfoje iomete misteraj. Nebrasilanoj ankaŭ profite informiĝas pri la naturo de kampara vivo en Brazilo, ĉiam leĝere, neniam predike. Ankaŭ amorrakontoj – kaj prikskriboj – ne mankas en la libro, do pre-

## Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko  
<http://retbutiko.esperanto.be>

### 1 Anna Löwenstein

dua eldono La ŝtona urbo *Prezo: 24,00 EUR*

### 2 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel

nova La kosmo kaj ni *Prezo: 18,00 EUR*



### 3 Lena Kapunina

La bato *Prezo: 12,00 EUR*

### 4 Pasporto al la tuta mondo

(parto 9-12) *Prezo: 81,00 EUR*

### 5 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck

Leksikaj ekskursoj (2) *Prezo: 14,00 EUR*

### 6 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck

Grammaire ABC d'Espéranto *Prezo: 23,00 EUR*

### 7 Maria Becker-Meisberger

dua eldono Internacie kuiru *Prezo: 10,00 EUR*

### 8 Johan Hammond Rosbach

Nomoj *Prezo: 8,00 EUR*

### 9 Ernest Claes

Kobo *Prezo: 24,00 EUR*

### 10 Daniel Moirand

Murdo en Esperantujo *Prezo: 5,95 EUR*

Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)  
Fakse: + 32 3 233 54 33

fere la leganto ne estu tro pudorema. Mi mem trovis ilin tre ĉarmaj, neofendaj. Kaj kiu amas fruktobrandon, nu, tiu ankaŭ interesoplene legos la tiurilatajn epizodojn. Ĉu la misfaroj de la Pastro, kaj la religio kiun li reprezentas, estas iom tro emfaze prirakontataj, en kelkaj epizodoj? Eble jes, eble ne. Dependas de onia vidpunkto. Do prefere la leganto ne estu tro religidefenda.

Kion pli diri? La lingvaĵo estas ĉiam klara, la stilo facile kaj ĝue legata. La preso estas tre bona, kaj – escepte de la lastaj 20-30 paĝoj (ĉu tie la kompostajkontrolisto eble ekdormis

kelkfoje?) – komposteraroj preskaŭ plene mankas. Kion kritiki? Nur ke la gluo kuntenanta la paĝojn estis iom tro avare uzita, tiel ke la lastaj folioj elfalis dum mia unua lego de la libro.

Mia simpla pritakso de la verko: nepre tre bona aldono al nia originala literaturo; salutinda ekapero de nova verktalentulo inter ni.

Donald BROADRIBB

Gersi Alfredo Bays: *La profeto el Pedras*. Eld. Fonto, Chapecó, 2000. 237 paĝoj glue broŝuritaj. ISBN neindikita. Prezo ĉe FEL: 21 eŭroj + afranko.



# Monato

**MONATO**, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

**Eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be) TTT: <http://monato.esperanto.be> Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

**Ĉefredaktoro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net)

**Redakcia sekretario:** P. Peeraerts.

**Reviziantoj:** Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Smidéliusz, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

**Korektanto:** Izabel C. Oliveira Santiago.

**Grafiko:** Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



## MONATO - redaktoroj

**Arto:** Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando. Reta adreso: [desperanto@mtu-net.ru](mailto:desperanto@mtu-net.ru)

**Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio. Reta adreso: [rotsaert@esperanto.be](mailto:rotsaert@esperanto.be) (nur askiaj dosieroj!) Komputilaj detaloj: WordPerfect 5.1 kaj 6, Word 6, Ĉapelilo, ASCII.

**El mia vidpunkto:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net)

**Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 59, 4700 Eupen, Belgio. Reta adreso: [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo, Word 97.

**Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

**Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)

**Komputado:** Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL. Reta adreso: [edmund@rano.org](mailto:edmund@rano.org)

**Leteroj:** Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Reta adreso: [guido@fel.esperanto.be](mailto:guido@fel.esperanto.be)

**Libroj:** Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono. Reta adreso: [kolker@stratos.net](mailto:kolker@stratos.net) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo.

**Noto:** Librecozojn oni ne sendu al la redaktoro propralnciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

**Lingvo:** YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Reta adreso: [syama@dokkyo.ac.jp](mailto:syama@dokkyo.ac.jp) Komputilaj detaloj: DOS - WordPerfect 5.1; Mac - MS Word; sed per retpoŝto, bv. ĉiam sendi DOS-tekstodosieron!

**Medio:** Haszpra Ottó, HÚR u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com) Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

**Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo. Reta adreso: [mattos@super.com.br](mailto:mattos@super.com.br)

**Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: [100103.3317@compuserve.com](mailto:100103.3317@compuserve.com) Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

**Scienco:** Haszpra Ottó, HÚR u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: [haot@freemail.hu](mailto:haot@freemail.hu)

**Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando. Reta adreso: [gerrit.en.madzy@planet.nl](mailto:gerrit.en.madzy@planet.nl)

**Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net) Komputilaj detaloj: Ĉapelilo kaj Calamus por Windows.

**Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: [a9308197@unet.univie.ac.at](mailto:a9308197@unet.univie.ac.at)

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

# Skandaloj

## El taglibro de Z-komitatano de Interkontinenta E-Kolektivo (IEK) por Nenilando

### 2083a jaro, Interkontinenta Kongreso (InKong).

*01 de aŭgusto.* Hodiaŭ mi parolis kun alia komitatano pri s-ro ABCDEF, nova kandidato al prezidanta posteno. Laŭ li, Abcdef iam kaŝe lernis Volapukon. Skandal'!

*02 de aŭgusto.* Dum la elektoj mi malferme diris en la vizaĝon de Abcdef pri lia volapukeco. Li ekploris kaj rezignis pri la posteno. Sed strange: ne ni proponis min anstataŭ li!

*03 de aŭgusto.* Mi estas embarasita: oni petegis al Abcdef ke li tamen kandidatiĝu! Li konsentis ... Kion fari?

### 2084a jaro, InKong.

*01 de aŭgusto.* Ĵus mi aŭdis klaĉojn ke Abcdef havas gravan malsanon: li ofte vomas en aviadiloj. Kun tia malsano li ne plu rajtas prezidi! Jen bonega skandalo!

*02 de aŭgusto.* Dum akceptado de la jarraporto mi rekte akuzis lin pri lia neutileco. Li falis surgenuen, ekpreĝis, konsentis kaj demisiis. Nun estas 23:30, dum proksimaj minutoj mi atendas proponon ke mi kandidatiĝu anstataŭ li.

*03 de aŭgusto.* Nova ŝoko: la komitato deklaris ke se Abcdef vere demisiis, tiam tuta organizaĵo oficiale

malfondiĝos. Post plurhora hezitado li decidis resti prezidanto. Mi estas konsternita.

### 2085a jaro, InKong.

*01 de aŭgusto.* Oni flustras ke Abcdef elspezas SIAN monon por la organizaj bezonoj. Ho skandaleg'! Tio vere estas ne plu eltenebla. Baldaŭas la venko ...

*02 de aŭgusto.* Dum reelektoj mi kulpigis lin pri ĉi tio. Li jesis, kaj eĉ ne preninte la valizon forveturis al flughaveno rekte el la kunsido. Mi prognozas ke ĉi-foje por mi voĉdonos ĉiuj. Mi mem sindetenos – pro ĝentileco.

*03 de aŭgusto.* Damne. Oni sendis por li taksion, kaptis lin ĉe flughavena giĉeto. Li revenis kaj rekonsentis plu prezidi. Dum voĉdonado ĉiuj voĉdonis „por”. Mi kontraŭis, kaj iu sindetenis – mi havas suspektojn, kiu estis la sindeteninto ... Diablo ... Sed ĵus mi aŭdis klaĉon ke lia amikino plendas pri tio ke li tro multe okupiĝas pri la organizaj problemoj. Jen – finfine bonega preteksto por sekvajare tute certe demisiigi lin. Do, ankoraŭ estas la espero, kaj estas kialo por plu aktivi en tiu IEK ...

Grigori L. AROSEV

## Ekskurso mallonga

Ni veturis al aranĝo, tuta parenaro. Subite haltigis policistoj nian aŭtomobilon kaj flate diris al mi: „Ni elektis vin por la hodiaŭa premio, ĉar vi veturis eksterordinare bone.” Do, kion diri, se mi tro malofte stiras? Sed li demandis: „Kion vi faros per la mil germanaj markoj?”

Mi respondis, ke nun fine mi povos akiri mian stirlicencon. La mi-eno de la policisto ŝanĝiĝis rapide, kaj tial mia edzino diris al li: „Ne aŭskultu mian edzon; se li ebrias, li ĉiam diras stultaĵojn.”

Venis dua policisto por kontroli, kaj ambaŭ gapis en nian aŭtomobilon, pro kio nia avino tre ektimis kaj kriis: „Mi tuj diris, ke ni ne povos longe veturi per ŝtelita aŭtomobilo!”


Ni devis elaŭtiĝi, kaj ili kontrolis forte. Sed nia avo, kiu tre surdas, ne komprenis la situacion kaj demandis min laŭte: „Ĉu vi kredas, ke la policistoj trovos la opion, kiun vi kaŝis en mian valizon?”

Abrupte finiĝis nia ekskurso en arestejo ...

Klaus-Dieter ALBRECHT



„Se malforte bati ne sufiĉas...” (Temas pri fabriko, kiu produktas varojn el gumo. Fotita de Walter Klag en Vieno, 19a distrikto.)



## — anoncetoj —

(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega fonto de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

**Naturista Vivo**, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4\*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, Fő u. 41/5 HU-8531, rete: [nlalt@konyvtar.c3.hu](mailto:nlalt@konyvtar.c3.hu).

**Internaciisto**: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provkempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

**ESPERANTO**



# Eventoj

aperas dusemajne

pk. 87. Budapest,  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj fakso:  
+36-1-2828885  
[eventoj@hungary.net](mailto:eventoj@hungary.net)

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado

## EVENTOJ

La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto movado, pri okazaĵoj en Esperantio kaj pri aplikado de Esperanto.

Petu provkempleron de:

Eventoj

Pk. 87, Hu-1675 Budapest, Hungario

Rete: [eventoj@esperanto.org](mailto:eventoj@esperanto.org)

## INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO

Strážnice, Ĉeĥio, 14a-20a de julio 2001


*Karolo PIC kaj liaj mondoj*

Voĉdonado por OSIEK-premio Postkonferencaj ekskursoj dum 3 tagoj

E. Laubacher, 1 rue Bougainville  
78180 Montigny-le-B., Francio  
tel. +33 (0) 130 96 67 91  
ret. [eric@iname.com](mailto:eric@iname.com)

V. Ha / sala, pk 36, 69662 Straznice  
tel. +420 631 332 278  
ret. [vlada\\_hasala@iol.cz](mailto:vlada_hasala@iol.cz)

<http://osiek.org>



Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140  
2000 Antwerpen

valoro \_\_\_\_\_

Donaca  
karto

subskribo \_\_\_\_\_

bonvole de skribi en FEL ĉi karto

**Utila Donaco!**

- Difinu mem la valoron de via donaco.
- La kupono estas interŝanĝebla kontraŭ libroj, diskoj aŭ Monato-abono.
- Mendu la kuponojn ĉe butikoj de Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Tel: +32 3 234 34 00 Fakso: +32 3 233 54 33  
Retpoŝto: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

# IDEALA por libroamantoj ...

La serio Stafeto de Flandra Esperanto-Ligo estas daŭrigo de la fama eldonejo de Juan Régulo Pérez en La Laguna. Kiel iame en Kanariaj Insuloj, la verkoj kiujn FEL markas per Stafeto, estas altkvalitaj literature kaj prese. Depost 1986 en la serio jam aperis verkoj de i.a. Gaston Waringhien, Edwin de Kock, Krys Ungar, Eŭgeno Miĥalski kaj multaj aliaj.

Anoj ricevas dekonan rabaton (10%) je ĉiuj libroj en la serio Stafeto de Fel.

## Ŝparu kaj estu ĝisdata!

Membroj de librorondo Stafeto ricevas novaperintajn Stafeto-librojn kiel unuaj, tuj post apero kaj ĝuas rabaton kiu por unu aŭ du ekzempleroj de sama titolo altas 10%, kaj ekde tri ekzempleroj eĉ 40%!

## Kiel funkcias?


Vi deponu ĉe ni 25 EŬR (depono = mono kiu restas via kaj kiun vi kiam ajn povas repostuli). Vian monon ni utiligos por eldoni librojn. Kiam aperas nova libro en la serio, vi apartenas al ĝiaj unuaj legantoj.

## Via garantio

Se ial ne plaĉas al vi unu el la libroj kiujn ni al vi sendas, vi simple resendu la libron ene de ok tagoj kaj neniom pagu. Krome, ajnmomente vi rajtas retiriĝi el la librorondo. Vi ricevos vian deponon kaj ni ne plu sendos al vi librojn.

## Ĉu io por vi? Skribu al FEL:

Flandra Esperanto Ligo  
Frankrijklei 140  
2000 Antwerpen  
tlf. +32 3 234 34 00  
tlk. +32 3 233 54 33  
rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)  
<http://retbutiko.esperanto.be>



Stafeto  
librorondo